

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religi-kompara revuo
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Neŭtrale kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UTSLE (Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantistaj Judoj), U. E. A., ŬEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio).
 Membro de WCRP (*World Conference on Religion and Peace* / Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita al IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).

Subtenas la Iniciaton por **Unuiĝinta Religiaro** (*United Religions Initiative*), fondota en junio 2000.

לא תרצח :

Lo' tircâh. (Eliro 20,13)

Ne mortigu!

Ἀγαπᾶτε τοὺς
 ἐχθροὺς ὑμῶν.
 (Luka Ev. 6,27)

**Amu viajn
 malamikojn.**

وَإِنْ جَنَحُوا لِلسَّلْمِ فَاجْنَحْ لَهَا وَتَوَكَّلْ عَلَى اللَّهِ
 إِنَّهُ هُوَ السَّبِيعُ الْعَلِيمُ
 (Korano 8,62)

**Se ili kliniĝas al la paco,
 faru la samon kaj konfidu je Dio.
 Vere Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia.**

Ni
 konservu
 nian
 idealon
 kaj
 ne
 lasu nin
 subpremi
 de la
 malespero
 aŭ de
 bedaŭro.

(H. Hodler,
 UEA-fond.)

**Pacon
 nun!**

Ĉesigu
 la detruon,
 perforton
 kaj
 mortigadon
 ene kaj
 ekstere
 de viaj
 landlimoj:
**donu
 ŝancon al
 paco!**

(K. Enderby,
 UEA-prez.)

*Na hi verena verâni sammantîdha kudâcanam,
 averena câ sammanti, esa dhammo sanantano.*

"La Dharma pado" (*Dhammapada*, 5)

**Neniam malamo pacigas malamojn :
 ja ilin pacigas nur amo! Jen leĝo konstanta.**



Vorto de la redaktoro

Kiel mi skribis okaze de la Pers-golfa milito :
"por respekti la neŭtralecon de nia asocio mi ne volas politike enmiksiĝi (eĉ skribe) en tiaj eventoj (...): la deziro, la aspiro al vera, profunda [kaj justa] paco situas trans ĉiuj politikaj apartigoj, ĉar politiko intervenas nur por preparoli per kia rimedo atingi ĝin, aŭ kun kiaj kondiĉoj subskribi ĝin. Ĉiuj gehomoj (krom eble armil-vendistoj, sed tiam ne kiel homoj) konsentos ke ili volas pacon."

S-ro Bradio Moro, Prez. de *Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista*, fidis "pri sia eblo aranĝi la 5-an **Interreligion Seminarion Esperantistan**" en Kedzierzyn-Kozle (PL) ekde la 8-a de aŭgusto, (vd. p. 30) sed ne sendis la definitivan programon :
 bv. peti ĝin de : Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn.

En (savenda) Grésillon samtempe okazos joga kurso (8 ĝis 14-8-99), gvidota de R.-M. Laveau.

N.B. **Bonvolu** laŭeble **sendi viajn artikolojn** ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word Perfect...*) **sur disketoj** (3 1/2), **plie de** la surpapera kutima formo : tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon.
Mi ankaŭ povas ricevi ilin fakse (modeme).

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritaj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red. : Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

ASISTI-estraro : Prez. Y. Umeda – B. Moro : kasisto kaj komisiito pri kunvenoj (Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle) – Ch. Lavarenne : **sekretario** kaj vickasisto – G. Berveling : eksteraj rilatoj – L. Nordens-torm : Religia Antologio.

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individua abono (MA), t.e. 105ff / 35gld / 30DM / 20\$ (duone por malriĉaj landoj) al :

– CCP *Asistilo*, 1042177R Marseille (nur francoj !)

– UEA-konto *asis-r* – FEL-konto *clvr-n*

– Marek Krainski, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan

– aŭ B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$. . .

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 1998 : deviga por esti membro, kiom ajn ĝi estu (sed **minimume kvarono de la UEA-MJ** : 10 gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...**Ne forgesu kontribui, koran dankon !**

Enhavo

Perforto : ĉu ni preĝu kontraŭ la malamikoj ?, de Patro P. Beauchamp s.j. (F)	p. 3
Pacaj deklaroj de la papo, la rumana kaj rusa patriarkoj, la greka primaso, la dalai-lamao	p. 4
Oni ne plu mortigu ! (<i>Pakto de la jaro 2000</i>), de Georges Krassovsky (F)	p. 4
Universala Paco-Ĉarto , por paco en internaciaj rilatoj (Bharato)	p. 5
<i>La Serĉado de l'Gralo</i> : Fojfoje ŝajno trompas (el la romanika, 13-a jc.)	p. 6
[Katarismecaj poemoj :] <i>Vojoj kaj Mesaĝo</i> , de Mak Dizdar (Bosnio)	p. 9
<i>La Serio pri Gilgameŝ</i> : senkompata batalo (Kvina Tabuleto) (Ninevo kaj Uruko)	p. 10
Ni subtenu Sekvojon (Billy Waldon) : mortigota esperantisto ? (Kalifornio)	p. 12
Kun Johan-Paŭlo la II-a kontraŭ la mortpuno (Francio kaj Italio)	p. 12
La " Koridoro al Morto ", de Caryl Chessman (Kalifornio)	p. 13
La mens-laboroj, de Ilie Cleopa ; trad. N. Macovei (Rumanio)	p. 14
Sentencoj, de Gregorio la Sinajano (14-a jc., Makedonio)	p. 14
La heliantoj de la <i>starets</i> Kiriakos, trad. de Jacques Tuinder (NL)	p. 15
Propono de rezolucio pri Esperanto al la IARF-a Ĝenerala Konferenco (Kanado)	p. 19
<i>Jogosutro</i> de Patanĝali : la Plenumado, kun komentario de Vjaso (Bharato)	p. 20
Proponita Ĉarto de Unuiĝinta Religiaro (Usono)	p. 22
<i>La Horo de Dio</i> , de Ŝri Aŭrobindo ; trad. N. Penĉukov (Bharato / Rusio)	p. 24
Hispana "reveno" al Islamo , de Ibrahim Albert (E)	p. 24
Interreligia kunveno ĉe la Universala Kongreso en Berlino (D)	p. 26
Respondo al J. Lépeix, punkton post punkto, laŭ ŝia kritiko, de J. Gishron (Israelo)	p. 26
300-jariĝo de la Sikh-a Khalso (Bharato)	p. 27
Leteroj : Jacqueline Lépeix (F)	p. 28
Infanaj pensoj pri Dio, trad. de M. Sadler k E. Tóth (H) ; kaj anonima rakonto (Kebekio)	p. 29
Pri 5-a Interreligia Seminario Esperantista , de Bradio V. Moro (Usono / Pollando)	p. 30
<i>Granda Unueca Kredo</i> (ĉapitro 1-a : <i>Apero</i>), de Jebumo (Ĉinio)	p. 30
Leteroj : W. H. Simcock (GB), Prabhat Ch. Das (Bharato), T. Papp (H), J. Ferreira Anacleto (P)	p. 31
Ni ricevis : religiaj kaj spiritaj libroj , broŝuroj kaj novaj gazetoj	p. 32

Perforto : ĉu ni preĝu kontraŭ la malamikoj ?

Ĉu oni rajtas resti pasiva antaŭ agreso, precipe kontraŭ iu(j) kiu(j) ne kapablas sin defendi sola(j) ; aŭ ĉu oni devas aldoni plian perforton al jam terura perforto, agresante la agresanton ? Ĉu tolero povas toleri maltoleron kaj perforton ? Ĉu preĝo rajtas peti venĝon kontraŭ malamikoj, eĉ ilian morton ?

Jen pripensigaj eltiraĵoj el 11-paĝa profunda studo pri la bibliaj psalmoj, titolita "Perforto kaj Biblio", de Profesoro pri ekzegezo ĉe teologia fakultato en Parizo, la jezuita pastro **Paul Beauchamp**.

(...) La Psalmoj helpas nin vidi laŭ kiuj vojoj la Psalmisto estas kondukata al **venko gajnenda super sia propra perforto**.

Jam en la Psalmoj la skemo de la malamiko agadanta mem al sia propra morto estas tre klare legebla (...) : "Kiu fosas kavon kaj profundigas ĝin, tiu falos en la kavon kiun li pretigis" (7,15); "Eniĝis la popoloj en la kavon kiun ili elfosis ; en la reton kiun ili metis, enkaptiĝis iliaj piedoj" (9,15).

Tia bildo ofte ripetiĝas. Aŭ la malbonulo pereas per sia propra glavo (37,15), estas viktimo de sia propra lango (64,8), de sia malbeno (109,17), aŭ lia mensogo mortigas lin (Dan. 13,59). Ĉio jene resumiĝas : "La malbonulon mortigos [i]a malbono" (34,21).

Dank' al tiu temo ni povas (...) trovi unu el la risortoj kiuj kapablas **evoluigi la preĝon kontraŭ la malamikoj**. Ekde la komenco ĝi implicas ĉe la peteganto **paciencon** per kiu li **bremsas sian instinkton al perforto**, en mondo kie tiu ĉi instinkto malkateniĝas ĉiutage. En tia situacio kies viktimo li supoze estas, la Psalmisto ne benignas sian glavon, nek sian pafarkon nek siajn ĉarojn nek siajn ĉevalojn. Tiu ĉi kutima agmaniero ne estas lia. Li ne petas fariĝi la plej forta. Lia preĝo atendas ĉion de Dio sola.

Kvankam **agas al sia propra morto la malbonulo**, tia fino estas petata al Dio aŭ ĝi estas poste atribuata al Li : "Li returnas kontraŭ ili iliajn malbonagojn" (94,23) (...) La *Saĝo de Salomono** provos ekspliki la tutan historion de la Savo (...) laŭ la principo de la detruo de la malbono per si mem. (Vidu *Saĝo* 11,16 : "Oni estas punata per tio, per kio oni pekas"). Rekonu en tiu ĉi principo la agon de Dio mem estas simpla maniero honori la dian transcendecon, neredukteblan al la sinsekvo de la kaŭzoj, nekapteblan. (...)

Kio estas tiel ĉi petata, tio estas la disvolviĝo de [natura] **proceso** kiu [samtempe] estas justeca proceso. Kiam *la malbono mortigas la malbonulon*, tio ne venas de ekstere kiel gilotina tranĉilego aŭ kiel dia interveno en spektakle impresa formo. Tio estas nur la **manifestiĝo en la malbona homo**, de kio vere estas la malbono. En tio estas ia respekto de la esto : malbono ne povas produkti bonon. Se, el la malbono, Dio eligas la bonon, tio okazas nur post kiam la malbono rivelis sian veran naturon, kio ne eblas sen ke iu suferas.

Kiam la Psalmisto preĝas li ne revas ; legante kion li verkis, neniu povas kredi ke li preĝas por forgesi. Volegi la justecon, tio estas akcepti la riskon esti submetata al la provo de longa atendo.

Laŭ tiu vidpunkto, la preĝo kontraŭ la malamikoj povas gardi sian tutan sencon kiam ĝi petas la detruon de *ilia* malbono, *ne* tiun de *ili mem*. La malamikoj estos detruitaj [kiel malamikoj] kiam ili fariĝos justaj [do la celo ne estas mortigi ilin] !

Kristana vidpunkto

Tiu ĉi justeco estas ĉe la kerno de kio estas petata de ni kiam ni laŭtlegas la Psalmaron. "Vere mi diras al vi ke vi neniel eliros el tie ĝis vi pagos la lastan groŝon" (Mt 5,26) (...) Kion la kristanoj nomas amo, tio neniam realiĝos per forviŝo de la justeco. **La malvenko kiun ni petas por la subpremanto estas ke li verŝu amarajn larmojn pri la subpremado kiun li faris**.

La Revelacio kiu estas la enhavo de *Apokalipso*, havas sian kulminon en la manifestiĝo de la kruco de Jesuo kiel fina venko. Tio evidente transformas ĉion : (...) tiu venko ĉiun fierulon "frakasas kiel potan vazon" (2,9). Jesuo Kristo "mortigis la malamon" (Ef 2,16), **mortigo sen kiu tute ne utilis "proklami la pacon"** (samloke). (...) La vorto "mortigi", en tiu kunteksto, daŭre atentigas pri la danĝero [imagi] superi perforton nur en revo, aŭ en pacifismaj paroladoj.

Oni ofte diras ke la "preĝo kontraŭ" estas akceptebla kiam la preĝanto donas al la vorto *malamiko* alian sencon : demono, aŭ malbonaj pasioj. Sed eble estas pli grave, pli radike, doni alian sencon al la *verboj* : venki, frakasi, dispeli, konfuzi. La **kruco de Jesuo faras ĉion ĉi per dolĉo**. Laŭ *Apokalipso* la vortoj rilataj al venko taŭgas por kiuj "formetis sin-amon ĝis morto mem" (Ap. 12,11). La armiloj estas tiuj de Jesuo.

Rilate la venkitoj en tiu batalo, ili ja povas esti homoj. Tiam ili estas "nenocivigitaj", kiel oni diras, se la kruco de Jesuo kaj tiu de liaj fideluloj ilin transformas. Se ĝi ne transformas ilin, ili estos **agadintaj al sia propra [spirita] morto eĉ se ili ŝajne venkis**, laŭ la ĉi-monda vidpunkto. □

(El *Documents épiscopat*, n-ro 11 (junio 1986), p. 6-7.)

* Duakanona greklingva libro, nur atribuita al li.

Oni ne plu mortigu !

(Pakto de la Jaro 2000)

☆ Se vi abomenas ĉian perforton ;

☆ Se vi konsekvence deziras ke homoj ĉesu sin interbuĉi dum militoj, kiaj ajn estu la "pravigoj" ;

☆ Se vi opinias ke malŝpari gigantajn sumojn por aĉeti armilojn kaj **subteni armeojn** estas **stultaĵo**, **ĉar tiu ĉi mono pli taŭgus por instruado**, lukto kontraŭ poluado kaj forigo de mizero ;

Nur *aŭdacu* indvidue kaj publike esprimi per blankaj rektanguletoj (4 x 6 cm), kiujn vi povos facile eltondi kaj **glui** sur **via enirpordo**, sur **vij fenestroj**, ankaŭ sur la antaŭa kaj malantaŭa vitroj de **via aŭto**, kaj eventuale la montrofenestro de **via vendejo** ktp. La tieaj blankaĵoj signifos ke vi

subtenas la Pakton de la Jaro 2000, laŭ kiu ĉiu **homa vivo estas netuŝebla**. Plej gravas fari tion tuj kaj sen atendi ke aliaj tion faros.

Tamen, tio estas nur komenco de multe pli ampleksa elmontrado. Proksime de la Jaro 2000, pli precize ekde 21-12-1999 (la lasta vintra solstico antaŭ la Jaro 2000), tiuj rektanguletoj anstataŭendos per blankaj folioj (21 x 29,6 cm) por fari tiun "voĉdonadon" ankoraŭ pli impresa.

Ĝis tiam oni certe elpensos aliajn manierojn por manifestiĝi, uzante la blankan koloron kiel pac-simbolon : per standardoj, flagetoj, oriflamoj, girlandoj, balonoj, insignoj, rubandoj, ktp. Vera "blanka tajdo" nekontesteble atestus la komunan sopiron al Paco, vera Paco, senarmila Paco !

La neneigebla avantaĝo de tiu agado estas ke ĝi ne necesigas organizaĵon, kaj preskaŭ neniun elspezon. Tute ne temas pri aliĝo al io, nek subskribo de peticio. Temas pri simpla ago sed kiu, se ĝi estus plenumata ĉie en la mondo, povus havi grandegan psikologian efikon, kaj ĝisradike ŝanĝi la etoson de la planedo. La destino de la mondo dependas de ĉiu el ni ! **Georges Krassovsky**

Kontaktadreso : *Le Nouvel Humanisme*, B.P. 164, F-75664 Paris cedex 14. Faks. : 33 (0)1 45 40 08 06.

Vera paco konstrueblas nur sur unu moralo, taŭga por kaj la popoloj kaj la indviduoj : absolute malpermesi mortigi homon, pro kiu ajn motivo.

Sinteno de religiuloj

Johan-Paŭlo la II-a, dum vojaĝo en Rumanio (7/9-5-99), kaj Lia Moŝto Teoctist (teoktist), patriarko de Bukareŝto, komune esprimis sian "**homan kaj spiritan solidarecon kun ĉiuj kiuj estas forpelataj de siaj domoj (...)** kaj kun la viktimoj de mortigaj bombadoj", invitante "**la partiojn partoprenantajn en la konflikto definitive demeti la armilojn**".

La greka primaso, M-ro Ĥristodulos deklaris : "**La problemoj ne povas solviĝi per perforto kaj armiloj. Nur dialogo povas konduki al solvo. Mi hontas pri tiuj kiuj estas fieraj pri sia titolo kristanoj kaj kiuj samtempe perfidas la principojn de kristanismo. Mi preĝas por la paco en la mondo, kaj speciale en Kosovo. Mi preĝas por ke triumfu justeco kaj respekto por la rajtoj de ĉiuj loĝantoj, kiu ajn estas iliaj nacieco kaj religio.**"

La rusa patriarko Aleksij diris : "**La bomboj de NATO ne alproksimigas nin al paco. Male, ili malproksimigas nin de ĝi.**"

La ŝejko Ĝaber al-Ahmed al-Sabah, kuvajta emiro, donacis unu milionon da dolaroj por helpo.



Volontuloj de la NRO El Hilal ("La Lunarko")

La Dalai-Lamao memorigis en Rio de Ĵanejro (5-4-99) ke en cirkonstancoj de krizo kaj streĉiteco oni devas gardi la pacon de la spirito kaj ne cedi al la pasio de malamo kaj de perforto, eĉ rajte motiviĝita per la krimoj de la kontraŭulo. Kelkajn tagojn poste li precizigis : "**Mi ne kredas ke perforto estas la rimedo por solvi la problemojn. La plej bona metodo estas dialogo. Tio ja bezonas pli da tempo kaj postulas decideman politikan volon.**"

En oktobro 1995 la serbaj esperantistoj "**interkonsentis pri ekfunkciado de E-Akademio en la ejoj de la monaĥejo Prohor Pĉinjski**". Nu, ni ekscias de *Actualité des religions* (junio), ke la greka ministrino pri Kulturo kaj la Internacia Konsilio pri monumentoj **alvokis Uneskon por ke estu domaĝataj de NATO "monumentoj historie tre valoraj"**, ĉar jam 39 estas difektitaj kaj tri detruitaj.

Kio pri la Akademio de niaj samideanoj ?



Universala Paco-Ĉarto

Principoj por paco en internaciaj rilatoj



Plie de la "Principoj por paco en sia *persona vivo*", adoptitaj ĉe Monto Abu en 1983* , la sama "*Universala Pac-Konferenco*" ankaŭ akceptis jenan Ĉarton, kies ĝenerala adopto kaj observado ŝajnas ankoraŭ pli necesa nun ol iam ajn.

(*Vidu n-ron 22 p. 3)

Kompreninte ke mondo, en kiu ĉiuj ĝuados pacon kaj prosperon, povas estiĝi per pureco, moralaj valoroj aŭ remodelado de la homa perspektivo tiel ke la **individua persono rigardu la homaron kiel unu grandan rondon familian,**

nun do, kiel politikisto aŭ diplomato aŭ individuo **profunde interesiĝanta pri internaciaj kaj interŝtataj rilatoj,**

mi adoptas

jenan *Universalan Paco-Ĉarton*, kiel aron da etikaj **principoj observendaj de ĉiuj nacioj kaj landoj en iliaj rilatoj kun aliaj nacioj kaj landoj,**

kaj la realigon, per laŭŝtupaj aranĝoj, de ties universala rekono kaj efektiva plenumado per la restantaj ŝtatoj aŭ nacioj :

Art.1 Ni konstante tenos antaŭ ni la **bonfarton de la tuta homaro** kiel nian unuan kaj plej gravan celon, kaj ĉiuj niaj politikoj, agadoj kaj celoj estos gvidataj de tio ĉi kiel plej alta principo, kaj tiel ni neniam forlasos la **bonvolon kontraŭ ĉiuj.**

Art.2 Niaj rilatoj kun aliaj nacioj estos kiel intergefratoj, **bazitaj sur amo, kunlaborado kaj reciproka helpo** por kresko kaj disvolviĝo.

Art.3 Ni donos ĝustan lokon kaj gravecon al la antaŭenigo de **moralaj valoroj** en nia eduka sistemo ; kaj ni kuraĝigos ĉiujn profesiojn, inkluzive tiun de la politikistoj, adopti etikan kodon kaj dungi homojn por kunordigi kaj kontroli ties plenumiĝo, eduki la kunprofesiulojn kaj entrepreni taŭgan proceson kontraŭ la deliktuloj.

Art.4 Ni solvos niajn konfliktojn kun aliaj landoj per **diskutado, traktado, mediacio, arbitracio,** aŭ per interveno de internacia agentejo, aŭ helpe de **procesoj, kaj ne uzos minacojn aŭ forton ; kaj ni ne nutros pensojn de rankoro aŭ venĝo** surbaze de provokaj eventoj el la historio.

Art.5 Niaj naciaj interesoj baziĝos sur la principo de *klera* memintereso, kaj ĉiuj niaj politikaj, ekonomiaj, kulturaj aŭ defendaj aranĝoj aŭ iloj estos tiaj ke ili ne agos kontraŭ la bonfarto de la homaro kiel tuto ; kaj ni do **ne uzos militajn aliancojn,** paktojn aŭ traktatojn **kontraŭ aliaj ;** kaj se ni jam havas tiajn aliancojn ktp., ni strebos atingi la celon de amikeco, frateco aŭ neŭtraleco kontraŭ ĉiuj.

Art.6 Ni rigardas universalan amon kiel pli bonan ilon de paco ol **trudita leĝo ; toleremon, bonvolon kaj komprenon** pli bonaj ol alfrontado ; **amikecon aŭ fratecon** certe pli bonaj ol armado ; kaj **krean silentadon** kiel superantan vortojn ; kaj ni do observos mallongan **tempon da silenta meditado antaŭ la komenco de ĉiu leĝofara, ekzekutiva aŭ justica laboro,** tiel ke tiuj ĉi kvalitoj povu regi en niaj pridiskutoj, juĝoj kaj agoj.

Art.7 Niaj sekurservoj estos nur por la gardado de internaj sekureco kaj leĝo kaj ordo ; kaj ĉiuj niaj **streboj** estos direktataj **al reduktado de niaj elspezoj por armiloj,** kaj ne al disvolvo sed reduktado de niaj sekur-servoj, grade laŭ la kresko de pacemo de niaj civitanoj kaj la pliboniĝo de niaj rilatoj kun aliaj nacioj.

Art.8 Ni uzos parton el nia budĝeto, ĝis nun elspezitan por armiloj kaj milita kresko, por bonfartaj agadoj kaj por la morala edukado de la infanoj kaj junuloj.

Art.9 Ni **antaŭenigos la homrajtojn** konforme al iliaj devoj, kaj konsekvence honoros kaj protektos la individuajn aŭ grupajn rajtojn **je libereco de penso, konscienco, esprimiĝo, religio, kulturo** kaj profesio, kiuj ne rompas publikajn pacon kaj harmonion ; kaj **ni atentos ke ne estu instigo al diskriminacio, malamo kaj perforto,** kaj protektos ĉiujn estaĵojn **kontraŭ torturo** kaj aliaj malhumanaj aŭ malnobligaj traktadoj aŭ punoj.

Art.10 Ni rigardos kiel la **plej gravajn malamikojn de la homaro,** malklerecon, krimon, malriĉecon, malsaton, malsanon, diskriminacion kaj perfortemon ; kaj senigon de iu ŝtato fare de alia, je ties rajtoj kaj ĝuado de siaj mineraloj kaj oceanaj riĉaĵoj kaj naturaj riĉfontoj ; kaj poluadon aŭ detruadon de la natura medio per industriaj, teknikaj kaj aliaj rimedoj ; kaj ĉiujn agojn kiuj kondukas al internaciaj streĉiĝoj aŭ konfliktoj. Kaj ni kiel eble plej strebos al malgrandigo de la ekonomiaj malegalecoj kaj al **definitiva eliminado de malriĉeco kaj malsato,** per edukado, kreado de pli da eblecoj de utila kaj pagita laboro, kaj per konstruaj kaj disvolviĝaj aranĝoj ; kaj strebos al laŭŝtupa malakriĝo de dividaj emoj kaj milit-agado, per antaŭenigo de amikeco kaj kompreno, kaj per morala persvado kaj per nia propra ekzemplo.

La Serĉado de l'Sankta Gralo :

[118.29] Quant il a chevauchié jusque a midi, si voit devant lui fors dou chemin une petite meson. Il torne cele part, car il set bien que ce est hermitages. Quant il est jusque la venuz, si voit une petite chapele en une petite meson. Et devant, a l'entree, se seoit uns vieil hom vestu de robe blanche en semblance d'ome de religion, et fesoit trop merveilleux duel et disoit : *"Biau sire Diex, por quoi avez vos ce soffert ? Ja vos avoit il si longuement servi, et tant s'estoit travailliez en vostre servise !"*

Quant Lancelot voit le preudome si tendrement plorer, si li em prent grant pitié. Il le salue et li dit : *"Sire, Diex vos gart."*

– *"Diex le face, sire chevaliers, fet li preudons. Car s'il ne me garde de pres, je ne dout mie que li anemis ne me puisse legierement sorprendre. (...)"*

Stranga mortinto

(...) [119.14] Lors atache son cheval a un arbre et vet avant, et voit que dedenz l'entree dou mostier se gisoit morz par semblant un home chanu vestu de chemise blanche et deliee, et delez lui une haire aspre et poignant.

Quant Lancelot voit ce, si se merveille molt de la mort au preudome. Il s'asiet et demande comment il est morz. Et cil li dit :

"Sire chevaliers, je ne sai ; mes je voi bien qu'il n'est pas morz selonc Dieu ne selonc ordre. Car en tele robe come vos le veez ne puet nus tiex hons morir, qui n'ait religion enfrainte ; et por ce sai je bien que li anemis li a fet cest asaut par quoi il est morz. Si est trop grant damages, ce me semble : car il a bien demoré el servise Nostre Seignor plus de trente anz."

– *"Par Dieu, fet Lancelot, cist damages me semble trop granz, et de ce qu'il a son servise perdu et de ce qu'il a en tel aage esté surpris de l'anemi."*

Ekzorcado

Lors entre li preudons en sa chapele, et prent un livre et une estole (et met entor son col), et vient fors et comence a conjurer l'anemi. Quant il a grant piece leu et conjuré, il resgarde et voit l'anemi devant lui en si laide figure qu'il n'a cuer d'ome el monde qui poor n'en eust.

"Tu me travailles trop, fet li anemis ; or m'as, que me veuz tu ?"

– *"Je voil, fet il, que tu me dies coment cist mien compainz est morz, et s'il est periz ou sauvez."*

Lors parole li anemis a vois orible et espoentable et dist al preudome :

"Il n'est pas periz, mes sauvez."

Lancelot rajdis ĝis tagmezo : tiam li vidas antaŭ si, for de l' vojo, malgrandan domon. Li turniĝas en tiu direkto ĉar li ja scias ke tio estas ermitejo. Kiam li alvenas tie, li vidas malgrandan kapelon en malgranda domo. Kaj antaŭe, ĉe la enirejo, maljuna homo vestita per blanka robo kiel religiulo, sidis kaj faris ege mirindan funebbron kaj diris : "Bela sinjoro Dio, por kio vi permesis tion ? Jam tiel longe li servadis vin, kaj li tiom penis en via servo !"

Kiam Lancelot vidas la noblulon tiel tenere plori, li multe kompatas lin. Li salutas lin kaj diras al li : "Sinjoro, Dio vin gardu."

– *"Dio tion faru, sinjoro kavaliro, respondas la noblulo. Ĉar se li ne gardas min zorge, mi ne dubas ke la malamiko povos facile logi min. (...)"*

(...) *Tiam Lancelot alligas sian ĉevalon al arbo kaj iras antaŭen, kaj vidas ke en la enirejo de la monaĥejo kuŝas mortinto, ŝajne blankharulo vestita de blanka kaj delikata ĉemizo, kaj apud li kruda ĉemizo, raspa kaj pika.*

Kiam Lancelot vidas tion, li multe miras pri la morto de l'noblulo. Li sidiĝas kaj demandas kiel li mortis. Kaj la maljunulo diris al li : "Sinjoro kavaliro, mi ne scias : sed mi ja vidas ke li ne mortis laŭ [la volo de] Dio nek laŭ la regulo ĉar en tia vestaĵo kiel vi vidas lin, povas morti neniu tia homo, sen malobservi la religion ; kaj pro tio mi ja scias ke la malamiko faris al li tiun atakon per kiu li mortis. Tio estas ege granda bedaŭrindaĵo, ŝajnas al mi : ĉar li restis en la servado de Nia Sinjoro ja pli ol tridek jarojn." – "Per Dio, diris Lancelot, tiu ĉi bedaŭrindaĵo ŝajnas al mi ege granda kaj pro tio ke li perdis sian servon kaj pro tio ke en tia aĝo li estis logata de la malamiko."

Tiam la noblulo eniras en sian kapelon, prenas libron, kaj stolon kiun li metas ĉirkaŭ sian kolon, venas eksteren kaj komencas ekzorci la malamikon. Post kiam li laŭtleĝis kaj ekzorcis dum longa tempo, li rigardas kaj vidas la malamikon antaŭ si, en tiel malbela formo ke ne estas koro de homo en la mondo, kiu ne timus. "Ci min turmentegas, diras la malamiko ; nun ci havas min, kion ci volas de mi ?"

– *"Mi volas ke ci diru al mi kiel ĉi frato mia mortis, kaj ĉu li pereis aŭ estas savita."*

Tiam la malamiko parolas per horora kaj terura voĉo kaj diras al la noblulo :

"Li ne pereis sed estas savita."

X – Fojfoje ŝajno trompas...

– "Coment puet ce estre, fet li preudons ? Il me semble que tu me mentes. Car ainsi ne le comande pas nostre ordre, ainz le vee tot plainement, que nus ne veste chemise de lin ; et qui la vest il trespasse ordre. Et qui en trespasant ordre muert, ce n'est mie bien, ce me semble."

– "Je te dirai, fet li anemis, coment il est alé de lui."

– "Kiel tio povas esti, *respondas la noblulo* ? Ŝajnas al mi ke ci mensogas. Ĉar tiel ne ordonas nia regulo, male ĝi malpermesas tute klare ke iu estu vestita per lina ĉemizo ; kaj kiu vestiĝas per tio, tiu malobservas regulon. Kaj morti transpasant regulon, tio ne estas bona, ŝajnas al mi."

– "Mi diros al ci, *respondas la malamiko*, kio okazis pri li."

Nobla eksnobelo

Tu sez bien qu'il est gentilx hons et de haut lignage, et a encor nevez et nieces en cest país. Si avint avantier que li quens del Val comença guerre contre un suen neveu qui avoit non Agaran.

Quant la guerre fu comenciee, Agarans, qui auques s'en veoit au desoz, ne sot que fere, si s'en vint conseillier a son oncle, que tu voiz ci, et le pria si doucement qu'il s'en issi de son hermitage et s'en ala o lui por maintenir la guerre contre le conte.

Si revint a ce qu'il suelt jadis fere, ce est armes porter. Et quant il fu assemblez a ses parenz, si le fist si bien de toute chevalerie que li quens fu pris a la tierce jornee qu'il assemblerent ; et lors firent pes entre le conte et Agaran, et dona li quens bone seurté que ja mes nel guerrieroit.

Quant la guerre fu apesiee et faillie, si revint li preudons a son hermitage et recomença son servise qu'il avoit maintenu maint jor.

Ci ja scias ke li estas ĝentila homo, kaj el alt-devena linio, kaj ke li ankoraŭ havas genevojn en tiu ĉi lando. Kaj okazis antaŭnelonge ke la grafo de l' Valo komencis militon kontraŭ iu nevo lia kiu nomiĝas Agaran.

Kiam la milito komenciĝis Agaran, kiu iam vidis sin malsupera, ne sciis kion fari ; tiam li venis konsiliĝi kun sia onklo kiun ci vidas ĉi tie, kaj petis lin tiel dolĉe ke tiu eliris el sia ermitejo kaj iris kun li por subteni la militon kontraŭ la grafo.

Li tiel revenis al kion li antaŭe sciis fari, tio estas militi. Kaj kiam li kuniĝis kun siaj parencoj, tiam li tiel bone faris tion per sia tuta heroeco, ke la grafo estis kaptata la trian tagon de la batalo ; kaj tiam ili faris pacon inter la grafo kaj Agaran, kaj la grafo donis bonan certigon ke li neniam plu militos kontraŭ li.

Kiam la milito estis pacigita kaj finita, la noblulo revenis al sia ermitejo kaj rekomencis sian servadon, kiun li estis daŭriganta multajn tagojn.

Perfida venĝo

Mes quant li quens sot qu'il avoit esté desconfiz par lui, si pria a deus de ses nevez qu'il l'en venjassent. Et il distrent que si feroient il.

Il vindrent maintenant ceste part, et quant il furent descenduz devant ceste chapele, si virent que li preudons estoit ou servise de la messe. Si ne l'oserent mie assaillir en tel point, ainz distrent qu'il atendroient tant qu'il issist de laienz ; si tendirent un paveillon ci devant. Et quant ce fu chose qu'il ot dit son servise et il fu issuz de la chapele, cil distrent qu'il ert morz. Si le pristrent et trestrent lor espees.

Sed kiam la grafo eksciis ke li estis venkita de li, tiam li petis du el siaj nevoj ke ili venĝu lin. Kaj ili diris ke ili faros tiel. Ili tuj venis ĉi tien kaj kiam ili deĉevaliĝis antaŭ tiu ĉi kapelo, ili vidis ke la noblulo mese Di-servis. Ili do ne aŭdacis ataki lin en tia tempo, sed diris [unu al la alia] ke ili atentos ĝis li eliros el ĝi ; tiam ili starigis [rondan] tendon antaŭ ĝi. Kaj kiam finita afero estis la dirado de lia Di-servo kaj li estis eliranta el la kapelo, tiuj diris ke li tuj mortos. Tiam ili kaptis lin kaj elingigis siajn glavojn.

Unua miraklo

Et quant il li cuidierent la teste couper errant, Cil qu'il avoit toz dis servi mostra sus lui si apert miracle qu'il ne porent sus lui ferir cop dont il li poissent maufere, et si n'avoit vestu fors sa robe ; et despeçoient ausi lor espees, et rebouchoient come s'il ferissent sor une enclume.

Kaj kiam ili kredis ke ili tuj tranĉos lian kapon, Tiu kiun li ĉiam servadis montris pri li tiel evidentan miraklon ke ili ne povis kontraŭ li doni baton per kiu ili povus mistrakti lin ; kaj tamen li estis vestita nur per sia robo ; kaj iliaj glavoj breĉetiĝis kaj resaltis kvazaŭ ili batus kontraŭ amboson.

Si i ferirent tant que lor espees furent toutes despeciees, et il furent lassé et travaillié des cous qu'il li orent donez, ne il ne li avoient encore fet tant de mal que sans fust issuz de lui.

Furioza senhonteco

Quant il virent ce, si furent tuit desvé d'ire et de mautalent. Il porterent esche et fusil et alumerent le feu ci devant, et distrent qu'il l'ardroient, car encontre feu ne dureroit il pas. Si le despoillierent tout nu et li osterent la haire que vos veez ilec. Et quant il se vit ainsi nu, si en ot honte et vergoigne de soi meismes ; si lor pria qu'il li baillassent aucun garnement, qu'il ne se veist si vilainement com il estoit. Cil furent felon et cruel et distrent que il ne vestiroit ja mes de linge ne de lange, ainz morroit.

Trankvila defio

Quant il oï ce, si comença a sozrire et respondi :
– "Coment, fist il, cuidiez vos que je puisse morir par cest feu qui ci est apareilliez por moi ?
– Vos n'en avroiz ja, font il, se la mort non.
– Certes, fet il, seignor, se [a] Notre Seignor plest que je muire, il me plest molt. Mes se g'i muir, ce sera plus par la volenté Nostre Seignor que par le feu : car cist feus n'avra ja tant de pooir desus moi que poil de moi en soit brullez ; ne il n'a ou monde chemise si deliee, se je l'avoie vestue et puis entrasse a tout el feu, qui ja en fust mau-mise ne empiriee."

Quant il oïrent ceste chose, si tindrent tout a fable quan qu'il disoit ; et neproquant li uns d'els dist qu'il verroit par tens se ce porroit estre voirs.

Dua miraklo

Si osta sa chemise de son dos, et li firent vestir, et tantost le giterent ou feu, qu'il avoient fet si grant qu'il dura des hier matin jusqu'a ersoir molt tart. Et quant il fu estainz, il troverent sanz faille le preudome devié ; mes il avoit la char si saine et si nete come vos poez veoir, ne la chemise qu'il avoit vestue ne fu autrement empiriee que vos poez veoir.

Et quant il virent ce, si furent mout espoanté ; si l'osterent de la et l'aporterent en ceste place ou vos le veez ore, et mistrent sa haire delez lui et s'en alerent a tant. Et par cestui miracle que Cil qu'il avoit tant servi a fet por lui, puez tu veoir apertement qu'il n'est pas periz, mes sauvez. Si m'en irai a tant, car bien t'ai devisé ce dont tu estoies en doute."

Et si tost com il ot ce dit, si s'en ala abatant les arbres devant lui et fesant la greignor tempeste dou monde, si qu'il sembloit que tuit li anemi d'enfer s'en alassent par mi la forest. □

Kaj ili tiom batis ke iliaj glavoj estis tute breĉetitaj kaj ke ili laciĝis kaj eksentis mem doloron pro la batoj kiujn ili donis al li, kvankam ili ankoraŭ ne faris al li tioman malbonaĵon ke sango elirus el li.

Kiam ili vidis tion, ili estis tute frenezigitaj per kolero kaj ĉagreno. Ili alportis tindron kaj fajrilon kaj ekbruligis la fajron ĉi antaŭe, kaj diris ke ili lin bruligos, ĉar kontraŭ fajro li ne rezistos.

Tiam ili malvestis lin tute nuda kaj deprenis la krudan ĉemizon kiun vi vidas tie. Kaj kiam li vidis sin tiel, nuda, li pudoriĝis kaj hontis pri si mem ; tiam li petis ilin ke ili donu al li vestaĵon, por ke li ne vidu sin tiel malbele kiel li estis. Tiuj estis senkompataj kaj kruelaj, kaj ili diris ke li neniam ricevos linaĵon nek lanaĵon, sed mortos.

Kiam li aŭdis tion, li ekridetis kaj respondis :
– "Kion ? li diris, ĉu vi kredis ke mi povos morti per tiu ĉi fajro kiu estas ĉi tie preparita por mi ?
– Per ĝi, ili diris, vi ricevos nenion krom morto.
– Certe, li diris, se plaĉas al Nia Sinjoro ke mi mortu, plaĉas al mi morti. Sed se mi mortos pro tio, tio estos pli pro la volo de Nia Sinjoro ol pro la fajro : ĉar tiu ĉi fajro neniam havos tiom da povo super mi, ke unu haro de mi brulos ; kaj ne estas en la mondo ĉemizo tiom delikata – se mi surmetus ĝin kaj poste enirus tute en la fajron – , ke ĝi iam estus malbonigita kaj difektita."

Kiam ili aŭdis ĉi tiun aferon, ili prenis tute kiel fabelon ĉion kion li diris ; kaj tamen unu el ili diris ke li vidos tuj ĉu tio povus esti vera.

Tiam li deprenis sian ĉemizon de sur sia dorso, kaj ili vestis lin kaj tuj lin ĵetis en la fajron kiun ili faris tiel granda ke li daŭris de hieraŭ matene ĝis hieraŭ vespere tre malfrue. Kaj kiam ĝi estingiĝis, ili trovis nedubeble la noblulon morta ; sed li havis la karnon tiel sanan kaj tiel puran kiel vi povas vidi.

Kaj kiam ili vidis tion, ili estis multe terurigitaj ; tiam ili deprenis lin de tie kaj lin portis en ĉi tiun lokon kie vi vidas lin nun, kaj ili metis lian krudan ĉemizon apud lin kaj foriris tuj. Kaj per ĉi tiu miraklo kiun Tiu, kiun li tiom servadis, faris por li, ci povas vidi klare ke li ne pereis sed estas savita. Nun mi tuj foriros, ĉar mi bone rakontis al ci tion pri kio ci dubis."

Kaj tuj post kiam li finis diri tion, li foriris frakasante la arbojn antaŭ si kaj farante la plej grandan tempeston en la mondo, tiel ke ŝajnis ke ĉiuj malamikoj el la infero foriris tra la arbaro. □

el Ŝtona dormanto

Mak Dizdar (1917-1971)

"Vi korpon lian do nur prenis
sed korpo tiu estis por li
malliberujo lia kaj
larmoj kiuj lin
venenis."

Vojoj

Vi intencas
Ke mi ne estu tial vi potence
Iras al mi. Vi sturmege
Ridante kaj plorante
Antaŭ vi
Ĉion skuas
Kaj detruas
Vi intence min potence fordetruias
Sed vi malpovas trovi
La veran vojon
Al mi (...)
Sed tio ne estas ĉio
Vi ne konas la leĝon de elekto
Inter korekto
Kaj malkorekto
Sed tio ne estas ĉio
Ĉar vi malplej scias ke en via vivo
La plej premaj luktoj estas
Kaj militoj veraj
Pri propra
Motivo (...)
Vi ne scias
kontraŭ kiu vi koleriĝas
Vi nenion scias pri mia vojaro
Vi ne scias ke l' vojo de vi ĝis mi
Ne identas la vojon
De mi
Ĝis vi
Vi scias nenion pri mia riĉo
Kaŝita de viaj povegaj okuloj
Vi ne scias ke al mi
Multon pli
Ol kredas vi
La sorto
Proponis
Kaj
Donis
Vi intencas min potence fordetrui
Sed vi malpovas trovi la veran vojon
Ĝis mi...

(p. 9-11)

Sarajevo, E-Ligo de Bosnio k Hercegovino, 1989, trad. J. Zarkoviĉ.

Mesaĝo

Vi venos iutage
Frukte de kirasuloj el nordo
Vi tutdetruos mian kastelon
Mense beata
Vortante
MI DETRUIS LIAN BELON
MI DETRUIS
MISKREDAN
LIAN
KREDON
Sed miros vi poste aŭdante ke
Mi repaŝas (...)
Sed mi el malproksimo al vi
Mian
Praveron
Buŝos (...)
Armilisto vi fine estas la plej furia
Kaj demandisto dia
Sangumita ĝisokule
Ĝisulule
Kolerege
Pro bataloj
Pro la vivaj
Kaj malvivaj
Sklavoj
Vi min bruligos mi scias
Fine de la rakonto
Vi min bruligos mi scias
Sur via sanktega
Kaj hela
Punbrulejo
Ĝi en vi
Jam
Subflamas
Sed mi sur tiu paroksisma
Kaj terurisma
Mortigejo
Eĉ
Ne
Ek-
Pro-
Tes-
Tos
Kaj mi estos kredo kiel ŝtono
Ĝis vian taskon vi plenumos
Ĝis plenumiĝos
Via
Tasko
Flamoplena

Tiun finon tian festos
Via trikrio
AMENA AMENA AMENA
Sur mia loko
Kuşos cindro
Pri kiu virinoj interluktos
Sed tiel post mi fruktos
Sur la unua ŝtona egajo
Dank'al bona
Kaj dolora mano
Floroplena
Flororiĉa
Slogano
KIAM EKŝAJNOS AL VI
KE CELO VIA ESTOS
AL SENCO VIA LA PLEJ PROKSIMA
SCIU KE ANKAŬ
KORPO
LIA
ESTAS
NUR
HONESTA
LIA
HEJMO
VI KORPON LIAN...
Ĉu mi ne diris jam al vi
Ke pri mi vi vere nenion scias
(...) Ke vi nenion scias
Pri mia mizera korpo
Nek kian ardan flamon
Gardas ĝiaj
Viloj
Mi vin atendas
Ĉar mi vin konas
Vi venos denove refoje
Vi ĵuregis pri tio
Per kaliko per kruco per glavklingo
Pro damna liturgiado
kaj incensa fumo ĝoja
Do
Venu
Mi kutimiĝis antaŭlonge al viaj
Kiel al malsanegoj inundoj
Venantaj el malproksimo
Kiel al grandegaj glacioj
Kaj teruraj profundoj
De akvoj portataj ĉiam pli forte
Per la nokta riverkuro
Obskuro.

(p. 77-81)

La Serio pri Gilgameŝ :

*El la Nineva versio "restas, sur ununura tabuletepeco, nur dudeko da versoj (el preskaŭ 300 !)".
Mi kompletigis per resuma traduko en la hitita kaj tabuleto el Uruk mem, kie iam reĝis Gilgameŝ...*

Ĉe la rando de l' Arbar',
senmove
ili kontempladis
la altecon de l' Cedregoj,
kaj ekzamenadis
de l'Arbar' la enirejon.
Per (multnombraj) iroj kaj reiroj,
(tie) Humbaba' pasejojn formis :
rektaj padoj,
multe trapasitaj vojoj.
Kaj (proksime) oni vidis
la Cedrego-Monton,
restadejon de la dioj,
la sanktejon de Irnini la tutsankta.
Antaŭ (tiu) Mont'
disvolvis siajn branĉojn la Cedregoj :
ombr' ilia estis plej agrabla,
saturita de parfumoj !
(Kvazaŭ) per mantelo, [la Arba]ro estis
de densej' kovrita :
(...), cedroj, bonodoraj ballukku-oj,
(kaj aliaj...)
[Kaj ĝi estis ĉirkaŭita de fo]saj' [unua],
dekdukilometr(ojn larĝ)a,
[kaj] per dua (?),
(nur) sepkilometra.¹

(Hitita "daŭrigo" :) Ili do alvenis sur la Monton,
kaj [sur tiu] Monto staris la Cedregoj.
Kaj Huŭaŭa vidis [ilin] de pli supre, [kaj li diris] :
"La di-restadejoj [estas nesturmeblaj (?)] ;
la di-restadejoj, ja, sed la Cedrejon
ili ekokupis ! (...)"

(...) (Enkidu') hakilon sian prenis.
(...) [Ankaŭ] Gilgameŝ'
hakilon prenis.
[Ambaŭ] ekhakadis la Cedregojn !
[Kiam Huŭaŭa] la bruon aŭdis,
li furioziĝis : "Kiu [estas tie] ?
[Plantis mi la Cedrojn, kiuj (?)] iĝis grandaj.
Ĉu cedregoj estas dehakataj [su]r la Monto ?"

Tiam, el l' Ĉiel', Ŝamaŝ-la-ĉielulo
alparolis (al Gilgameŝ kaj Enkidu) : "Ek, antaŭen !
(Kaj) ne timu ! (Tuj) penetru en (la Arbaregon),
dum ankoraŭ ne hejrestas li,
nek [per brilegoj (?)] siaj li sin vestis."
[Tion ĉi] Huŭaŭa aŭdis kaj li [koler]iĝis.
Enkidu' kaj Gilgameŝ' alproksimiĝis
kaj furioz[igis] Huŭaŭa-on sur la Mont' !

Al ili tiam diris li : "(Ja) [mi] vin lev[os],
kaj ĝis la Ĉiel' vin jet[os] !
[Ne !], mi tuj vin batos kaj vin sendos
funden de la ter' obskura (t.e. en inferon) !"

Li ja ilin le[vis], sed [al la Ĉiel'] ne jetis ;
li ja ilin ba[tis], sed ne sendis ilin
funden de la ter' obskura.² (. . .)

(Uruk-tabuleta daŭrigo :)
Malferminte sian buŝon, ekparolis Humbaba',
kaj Gilgam[eŝon] alparolis :
"Ĉu do tiel senkonsciaj frenezuloj
cin konsilus, Gilgameŝ',
ke ci por min alfronti venis ?
[H]e, Enkidu, fiŝidaĉo :
ci neniam konis cian patron,
kaj simile al testudoj
ci neniam suĉis ja patrinajn mamojn !
[E]n juneco cia, cin observis mi,
sed mi evitis cin frekventi !
[Se mi (nun tuj)] cin mortigos (?),
(ja) animo mia feliĉiĝos (?)
[Ĉar ja ci] kondukis ĝis ĉi tie Gilgameŝon !
[Ci kondutis kiel] malamik', fremdulo furioza.
Mi d[evintus, Gi]lgameŝ',
[disŝiri lian] gorgon
kaj ĝin doni kiel nutron al serpentarioj (?) kriĉaj,
al la agloj kaj vulturoj !"

Tiam Gilgameŝ malfer[mis] sian buŝon
kaj, ekparolante, alparolis Enkiduon :
"Ho amiko mia, la vizaĝ' de Humbaba' ŝanĝiĝis !
Kaj staturo lia [grandegiĝis (?)] (...)
Mia koro [ne eltenos (?)]
[kaj pro timo (?)] mi tuj [svenos (?)] !"

Sed Enkidu malferminte sian buŝon
kaj ekparolante, alparolis [Gilg]ameŝon :
"Kial do, amiko,
ci parolu kiel almozul' (kun timo),
kial ci per man' la buŝon kovras
kaj parolas kaŝe (?) ?
(Restas) nun (nur) unu (elirejo ?) :
la fandita kupro jam survojas al muldilo sia*.
(...)
Por diluvpluvigi batojn
kvazaŭ per skurĝeg',
[ne c]edu lokon
nek (eĉ unu paŝon) malantaŭeniĝu !
(...)
nur pliforte batu !³ (...) " (. . .)

senkompata batalo (5-a Tabuleto)

(Gilgameŝ starante) kontraŭ (?) (Humbaba')
lin batis ĉe la kapo.

Ili tretis la terenon
per kalkanoj,
disigante per movegoj siaj
la Hermonon disde la Lebanon.

La ĉielo luma
iĝis nub' malhela.

Kazaŭ de nebulo
pluvis morto.

Ŝamaŝ kontraŭ Humbaba'
tempestojn levis :

Vent'-la-Norda, Vent'-la-Suda,
kaj la Orienta kaj la Okcidenta,
Vent'-la-Blova, la Skuala, kaj la Kirliĝanta,
kaj la Polva, la Malbona,
kaj la Malsaniga, la Frostiga,
la Ciklona kaj la Uragana :
ĉiuj Dektri Ventoj sturmis sur lin,
tiom ke vizaĝo lia malheliĝis :
li ne povis paŝi,
nek antaŭen nek eĉ malantaŭen,
(ĉiam) atingebla
de l' armiloj de Gilgameŝ.

Humbaba' volante savi sian vivon,
alparolis (Gilgameŝon) :

"Estis ci infan', [Gilgameŝ],
cin patrino cia naskis,
kaj ci estas id' de (...)

(...)

Ci [le]viĝis dank'al la bonvolo
de Ŝamaŝ', la Reĝ' de tiu Monto,
ho ci, ido de la kor' de Uruk,
suveren' Gilgameŝ !⁴

(...)

Sur [la Monto (?)]
mi restados (je dispono) cia,
[mi liveros al ci (?)]
tiom da Cedregoj kiom ci (bonvolos) mendi.
Mi rezervos al ci (ankaŭ) Mirt-arbedojn,
(kaj aliajn arbojn...),
kaj lignaĵojn (por) ornami
[la Domegojn de la Urbo (?)] !"

Sed [En]kidu, malferminte sian buŝon
kaj ekparolante, [alparolis Gilgameŝon] :

"Ne aŭskultu, [ho amiko mia,]
[la parolojn (?)] de Humbaba,
[kaj] petegojn liajn
[ne elaŭdu] !⁵ (... ?)

Huŭaŭa-on
ja ne lasu vivi !"⁶

(...) (Sed Humbaba alparolis Enkiduon :)

"(Enkidu',) ci konas la projek[ton de Gilgameŝ],
(lian) planon pri l'Arbaro mia,
kaj ci scias ĉion kio estas
ja dirinda (por mildigi lian koron) !
Mi povintus cin forpreni kaj cin buĉi
en la fundo de l' densejo de l'Arbaro mia,
kaj cin doni kiel nutron
al serpentarioj kriĉaj, al la agloj kaj vulturoj !
Enkidu', en cia (pov')
nun estas (mia) liberigo :
petu Gilgameŝon
ke li lasu min plu vivi !"

Sed Enkidu, malferminte sian buŝon
kaj ekparolante, alparolis Gilga[meŝon] :

"Ho amiko mia,
la Gardiston de l'Arbar' de l' [Cedroj]
finmortigu, buĉu
kaj dispremu, ke li malaperu ;
Humbaba-on, la Gardiston de l'Arbar' de l'Cedroj
finmortigu, buĉu
kaj dispremu, ke li malaperu
antaŭ ol Enlil' la Di' Unua
aŭdos [lian vokon (?)],
ol la [grandaj] dioj
estos furiozaj kontraŭ ni,
en Nippur Enlil,
(kaj ?) Ŝamaŝ' en [Sippar (aŭ : Larsa) (?)].
Ci akiru
la eter[nan famon]
[esti] mem [venkinta (?)]
Humbaba-on !"⁷

(...) (Humbaba denove alparolis Enkiduon :)

"Enkidu', en c[ia] pov'
nun es[ta]s (mia) liberigo] :
petu Gilgameŝon
ke li [lasu] min plu vivi !"

[Sed E]nkidu, malferminte sian buŝon
kaj ekparolante, alparolis [Gilgameŝon] :

"Ho [a]miko mia, Humbaba-on, la Gardiston
de l'Ar[bar' de l' Cedroj, finmortigu,]
[buĉu kaj dispremu, ke li malaperu]
[antaŭ] ol [Enlil'] la (Di') Unua
[aŭdos lian vokon (?)],
ol la [grandaj] dioj
estos [fu]riozaj kontraŭ ni :
en Nippur [E]nlil,
(kaj ?) Ŝamaŝ' en [Sippar (aŭ : Larsa) (?)].
Ci akiru la eter[nan famon]
[esti] mem [venkinta (?)] Humb[aba-on] !"

Humb[aba'],
aŭdinte [tiujn ĉi parolojn (?)],⁸
[jene, kriis, malbenante (?)] :
" (. . .) Ili ambaŭ
ne atingu maljunecon !
Same kiel Gilgameŝ', amiko sia Enkidu'
ne trovu la (Alian) Bordon (= de l' saviĝo) !"

Enkidu', la buŝon malferminte kaj ekparolante,
alparolis Gilgameŝon :

"Ho amiko mia, vane mi parolis,
min ci ne aŭskultis !

Mi tuj [lin] forpelos (el la vivo) !"

(. . .) [Kiam por eskapi]
eksaltegis [Humbaba'],

elingis po kvin fojojn
la herooj, ambaŭ.

[Per] jetlancoj (?)

[lin mortigis ili (?)].

[Tuj tenebroj (?)] densaj
fa[li] sur la Monton !

[Jes, tenebroj (?)] densaj
fal[is] sur la Monton.⁹ (. . .)

Gilgameŝ' dehakis la cedregojn kies trunkojn

Enkidu' jen tie jen ĉi tie (ĉe la ŝelo) markis !

Kaj Enkidu, malferminte sian buŝon

kaj ekparolante, alparolis Gilgameŝon :

"Ho amiko mia, ni dehakis
(eksterordinare) altan cedron,

kies pinto

boris la ĉielon !

Ci el ĝi farigu pordon, altan je tridek ses metroj,

dekdu metrojn larĝan, duonmetron dikan ;

kaj pivotoj ĝiaj, centra, supra kaj malsupra,

estu po ses metrojn longaj !

Oni ĝin transportos al Nipur',

[portatan de] l'Eŭfrato,

kaj Nipur' ĝojegos !"

(...) Ili do konstruis flo[son]

(...)

[En]kidu', de sur la floso,

[helpis (?)]

dum [alportis (?)] Gil[g]ameŝ'

la kapon de Humbaba.¹⁰

(Fino de la Tabuleto V)

* Probable ia akada ekvivalento de la Zamenhofa :

"Kiu komencis kuiri ne forkuru de la fajro."

Referencoj (romanaj ciferoj indikas kolumnoj) :

- | | |
|------------------------------|----------------------------|
| 1/ Nineva I, 1-12 | 6/ 1-a hitita tab., IV, 56 |
| 2/ 1-a hitita tab., IV, 1-23 | 7/ W.22554s III, 1-15 |
| 3/ W.22554s I, 1-23 | 8/ W.22554s IV, 11'-19' |
| 4/ W.22554s II, 3-19 | 9/ W.22554s V, 1'-15' |
| 5/ W.22554s II, 23-29 | 10/ W.22554s VI, 4'-14' |

Ni subtenu *Sekvojn* (B. Waldon) mortigotan esperantiston ?

"SAT-ano en la mortoalo de Kalifornia mal-
liberejo, jam de ses jaroj atendas la ekzekuton"
estis la unuapaĝa titolo de *Sennaciulo* (aprilo 98).
"Dum tri jaroj li rifuzis laŭoficajn advokatojn, kaj
fine li akiris la rajton mem defendi sin. Malgraŭ
pluraj atestoj subtene al lia deklaro pri senkulpeco
la ĵurio agnoskis lin kulpa, je granda (sed silenta)
konsterno de la esperantistaro." (Giorgio Silfer)

En sekva numero Thomas Bormann aldonis :

"La demando ĉu Billy vere kulpas aŭ ne, inter-
tempe fariĝis duaranga, post naŭ jaroj en mallibe-
rejo, tempo kiu en multaj civilizitaj landoj jam
estas sufiĉa puno pro mortigo. Gravus nun ke la
vivo de **Billy estu savita**. (...) Nia tasko estas, kon-
stante kaj ĉie protesti kontraŭ la mortpuno."

"Mi parolis kun kalifornia amiko, advokato,
kiu restadas en Berlino nun ferie : leteroj al Billy
estas legataj de malliberejaj oficistoj. Korespondi
kun li povas utili por ekscii ion pri lia psika stato,
sed ne eblas rilati kun li pri la jura afero mem.

Forte apogas Sekvojn : Nathan Gant (ngant@
igc.apc.org) en reta teksto, kaj Sharon Hwang Col-
ligan (sharon@warmcove.com) en sia propra TTT-
ejo. Ŝi rekte atestis ĉe la proceso favore al li.

Se iu el vi bezonos pli da informoj aŭ la kom-
pletan dosieron, bv. kontakti min. Kun amikaj sa-
lutoj. **Gary Mickle** (101.121591@germany.net.de)."

(El lia ret-mesaĝo al SAT kaj H. Masson, 13-5-99)

Kun Johan-Paŭlo la II-a kontraŭ la mort-puno !

Plurfoje Johan-Paŭlo la II-a esprimiĝis kon-
traŭ la apliko de la mortpuno. Sen ambigueco.
Li ankoraŭ ĵus rediris tion en **Usono**, kie 38 ŝtatoj
aplikas la mortan verdikton.

Tro da landoj, el kiuj kelkaj havas konstitu-
ciojn influitajn de kristanismo, uzas tiun ĉi barba-
ran kaj profunde malhumanan punon. Ni ne ak-
ceptas tion. Ju pli multaj ni partoprenos en tiu ba-
talo kune kun la Papo, des pli lia voĉo povos esti
aŭdata. Ni de proponas al vi resendi tiun ĉi paĝon
al **La Vie** (pere de ASISTI-adreso). Ni iros al Romo
kun niaj amikoj de **ACAT** (*Agado de la Kristanoj
por la Abolicio de Torturo*), kunorganizantoj de tiu
ĉi agado, transdoni ĉiujn viajn leterojn de subteno
kaj kuraĝigo. Kaj, jes ja, ni tenos vin informataj.

Subskribu kaj subskribigu ĉirkaŭ vi !

*Mi subtenas Johan-Paŭlon la II-an
en lia batalo por la abolicio de la mortpuno
kaj mi deziresprimas ke la katolika katekismo
estu en harmonio kun la sinteno de la Papo.*

La "Koridoro al Morto"

Vi mortas sola ...sed oni rigardas vin morti : rita, malbela kaj sensenca morto. Ili enigis vin en la verdan ok-muran ĉambron, kaj ligas vin sur unu el la du metalaj seĝoj. Tiam ili eliras, ŝtopante la pordon malantaŭ si. Liberigita, la mortiga gaso suprenvenas en spiraloj avidaj trovi viajn pulmojn.

Vi enspiras la senkolorajn kaj fatalajn haladzojn. La universo senbrue diseriĝas. Nur dum horora momento vi ŝvebas en libereco : nigra, dika kaj definitiva ondo tuj englutas vin...

La viraj krimuloj kiujn Kalifornio destinis al morto, estas malliberigitaj en unu el la tridek kvar identaj ĉeloj kies numeroj estas 2436 ĝis 2469, ĉe la Koridoro al la Morto, atendante sian ekzekuton.

Situanta ĉe la suda flanko de la supera etaĝo de la norda ĉelar-konstruaĵo de [la prizono] San-Kventeno¹, ĉi tiu ĉelaro estas apartigita de ĉio alia. Tia, ĉirkaŭita de barikadita kaj maskita pasejo en kiu patrolas armitaj gardistoj, ŝlosita kaj reŝlosita, kontrolita kaj rekontrolita, ĉiumomente prigardata, tage kaj nokte, ĝi prezentiĝas kiel monumento starigita al la genio de la enŝlosado, kiun havas la homo vivanta en socia stato.

Ĝi ankaŭ estas defio por tiuj el la kondamnitaj kiuj ne volonte alkutimiĝas al la ideo lasi sin pasive konduki al la gasĉambro. (...) Antaŭ ne tiom da jaroj, unu el tiuj impetaj uloj estis mortpafata ĉar li trapasis pordon kuregante kun du komplicoj.

La senutileco de siaj streboj kondukis alian **ĝis la rando de frenezo**. (...)

La mortkondamnitaj estas mortigataj ĉi tie, en San-Kventeno, laŭ efika, nepersona, metoda kaj senbrua maniero, sub la ĉefkontrolado de la direktoro, profesia prizono-administranto, tre kapabla homo kiu, tute certe, ne aldonas entuziasmon al tiu ĉi parto de siaj devoj.

Averaĝe **po unu fojon ĉiumonate** la direktoro ricevas, per registrita letero, unu "ekzekut-mandaton" kiu ordonas al li, per juraj esprimoj, mortigi homon "per spirigado de letala gaso" – tio estas la lingvaĵo mem de la kriminala kodo – , kaj kiu kutime finiĝas per : "kion vi ne malplenumu, sub via respondeco". Kaj li neniam malplenumas ĝin.

La gaso kiu okazigas la morton estas liberigata en senmakula okangula ĉambro, malalta kaj ĉirkaŭita de multnombra ilaro, situanta en speciala alo de la norda ĉelar-konstruaĵo, ne for de la Mort-Koridoro. Per gasĉambro estis anstataŭigata la pendumo antaŭ duonjarcento, post kiam la kalifornia leĝofarantaro klinis la orelon al kvalifikitaj atestantoj kiuj esprimis al ĝi sian konvinkon ke

mortgasi homon estas multe pli altruisma ol longigi lian kolon kaj dancigi lin en aero. Vi sentas la diferencon, ĉu ne ? (...)

Estas ia riteco en la etoso per kiu ĉirkaŭiĝas ekzekuto. Iuj trovas terura tiun nepersonan kaj senŝanĝan rutinon. Legi la priskribon, eĉ tre dramatigitan, de la morto de nekonatulo en la gasĉambro, kaj partopreni en la agado kiel subjekto, estas tre malsamaj aferoj. En la unua kazo la hororo de la ĉambro estas komforte fora. La leganto konservas la eblecon akcepti sian perprokuran ekzekuton aŭ forlasi ĝin. Plie, multaj el tiuj kiuj verkas raportojn pri tiaj ceremonioj, emas uzi ŝablonaĵojn dirmanierojn. (...)

Sed (...) **ĉu mortpuno estas sukceso ? Neniel.** (...) Kial ? Ĉar la Socio ne povas detrui la malbonon detruante homojn. Ĉar justico kaj morto ne tre bone akordiĝas. Ĉar la "jarcenta konvinko" ke la plejalta puno pripensigas la krimonton estas absurda mito. (...)

Iam – eble ĉi-jaron aŭ la sekvan, aŭ ankaŭ eble ne antaŭ unu jarcento – la okuloj de la homaro malfermiĝos kaj ĝia kompreno stimulos ĝian imagon. Tiam, kuraĝe, **oni forigos tiun ĉi "restaĵon de la barbareco"** kio la mortpuno estas, kaj samokaze la lokojn similajn al la Mort-Koridoro.

Kaj, kvankam mi ne havas la arogon paroli nome de Dio, mi tamen estas tute konvinkita ke Li estos pli ol kontenta kiam ni ĉesos mortigi homojn invokante Lian nomon aŭ nian justicon.

La forlaso de la "tia kia"-punleĝo² kaj la abolicio de mortpuno ja malkatenos oponadon same rigidafektan kiel tondre bruan. Ĝi venos de tiuj kiuj, kvankam virtece proklamante sian fidon al leĝo, justico kaj homaro, same kiel sian kredon je la vivanta Dio, tamen ne aŭdacas provi siajn konvinkojn : ili fidis nur la ekzekutiston.

Mi devas konfesi ke la aserto ke la ekzekutisto estas "la ilo de Dio" lasas min indiferenta. **Multaj elstaraj teologoj, apogiĝante sur solidaj religiaj argumentoj**, kundividis tiun ĉi senton kun mi, kaj **estas firme kontraŭ la mortpuno**. □

(El C. Chessman, *Trial by ordeal*, N.Y. : Prentice-Hall, 1955 / *A travers les barreaux*, Presses Pocket, p. 11-24.)

1/ S. Kventeno (*Quintinus*) : martiro senkapigita en Francio la 31-10-287, post longa kaj kruela torturado.

2/ Tiu leĝo laŭ kiu la puno estu tia refaro kia estis la krimo (*okulon pro okulo, denton pro dento*, Lev. 24,20), estas menciita en la *Kodo de Hamurabo* (babilona suvereno, 1728-1686 a. K.), kies E-tradukon ĵus edlonis Andaluza E-Unuiĝo ; sed jam en la 14-a jc. a.K., ĝin anstataŭis monpunoj en Malgranda Azio (*Hitita kodo*).



La mens-laboroj



En la rumanaj Karpatoj meditadas en sovaĝejaj arbaroj **Ilie Cleopa** (elija kleopa), la plej sperta majstro orient-ortodoksa. Okdek-kvar-jara, li estis intervjuata de I. Balan*.

Kiuj estas la spiritaj laboroj de la menso laŭ la Sanktaj Patroj?

S. Gregorio "la Sinajano"¹ diras ke la kristana menso devas havi naŭ spiritajn laborojn, nome :

- kontemplado pri la enkarniĝo de nia Savanto Jesuo Kristo por la mond-elaĉeto ;
- natura kontemplado je spirito, t.e. la meditado pri la intencoj koncerne la kreaĵojn de Dio, pri la kreaĵa beleco, pri ties celo, pri la kreaĵ-harmonio ;
- mens-leviĝo el la vidaĵoj al la nevideblaĵoj, el la surtera beleco al la enĉiela beleco, el la pasemaĵoj al la eternaj aferoj, kvazaŭ algrimpe el ĉio surtera al tio enĉiela ;
- kvara menslaboro estas meditado pri la morto ;
- sekve, meditado pri la inferturmentoj ;
- meditado pri la paradiza beateco ;
- meditado pri la lasta juĝo ;
- meditado pri la Regno de Dio post la lasta juĝo ;
- kaj naŭa menslaboro, meditado pri la Di-timo kaj pri niaj pekoj.

"Kiaj estas la spiritaj mens-movoj ?"

La kristana menso havas tri movojn : la *rekta movo*, kiam oni meditas nur pri la Biblio kaj la mirindaĵoj de Dio. Ĉi movon povas provi ankaŭ la diablo por allogi la homon. La dua estas la *zigzaga*, kiam la homo meditas pri la Biblio sed ankaŭ pri la kreitaro. Ankaŭ ĉi movon povas provi la diablo se oni fervore meditadas. La tria nomiĝas *spirala*, kiam la homo mense malsupriĝas koren kiel la helikoj en siajn dometojn kaj de ĉi tie leviĝas al Kristo evitante la diabl-allogon.

Niaj multespertaj sanktuloj kaj piuloj ĉiam gardis la menson ankore kaj el ĝi preĝis, alparolis al Kristo kaj ekluktis kun la diablo. Ankaŭ la Savanto aldiras : "*Sed vi, kiam vi preĝas, eniru en vian ĉambreton, kaj ŝlosinte vian pordon, preĝu al via Patro, kiu estas en sekreto...*" (Ev. laŭ Mateo 6,6).

"Kiel utilas meditado pri la Dia kreitaro?"

S. Bazilo la Granda², en sia verkaĵo *Heksamerono* diras ke la tuta kreitaro vidita estas lernejo kaj bildo de la nevidita mondo. Li ankaŭ diras : "*Ĉiu floro kaj ĉiu herbo instruas nin pri Dio*". La vidita kreitaro esprimas la Biblion kaj la Biblio esprimas la kreitaron. (...) S. Gregorio el Kapadocio³ diras : "*La kreitaro distrumpetas ke ĝin kreis Dio*". Mi legis en iu libro ke filozofo pasanta en kampo bastonbatis la florojn : "*Mi forbatas ilin, ĉar ili tro sciigas al mi ke ilin kreis Dio.*"

La kreitaĵoj nomiĝas donacoj de Dio. Kaj kiel la fianĉo kaj la fianĉino interdonacas donacojn Dio same agas. Li donacas al ni la kreitaĵojn, sed ni donacas al Kristo niajn pensojn, preĝojn kaj amon. S. Antonion la Grandan (4-a jc.)⁴ iam demandis filozofoj : "*Antonio, kiuj estas viaj legolibroj ?*" Ĉi tiu, manmontrinte la ĉielon, la stelojn, la maron kaj la ĉirkaŭan naturon, diris : "*Jen miaj legolibroj, pli veraj ol la plej veraj libroj.*"

(El *Spiritaj interparoloj*, 1990, tr. Nicolae Macovei.)

1/ Naskiĝinta en Klazomeno (Κλαζομενοι) en 1255, kaptita de turkoj, elaĉetita de kristanoj, li iris al Cipro (Κυπρος) kaj Sinajo, kie li fariĝis monaĥo. Li trapasis Jerusalemon por iri al Atoso, la "Sankta Monto", kie li iniciatis la *hesikian* renovigon (de "ἡσυχία" : "trankvileco"). Post Saloniko kaj Konstantinopolo, ĉ. 1325 li iris al Parorjo en Makedonio kie li fondis tri monaĥejojn sur monto apud Bulgario kaj Rumanio († 1346).

2/ 330-379. Episk. de Cezareo en Kapadocio, "Patro de la monaĥoj" : lia *Regularo* influis tiun de S. Benedikto.

3/ ĉ. 330-ĉ. 395. Episkopo de Nuso (Νυσα) en Kapadocio ; frato de S. Bazilo. (Notoj de

4/ 251-356. Egipto. La "Patro de la ermitoj". *la Red.*)

Sentencoj de Gregorio la Sinajano¹

Vera sanktejo (...), tia estas la koro sen pensoj, en kiu agas la Spirito. Ĉar ĉio kio estas farata kaj dirata en ĝi estas la ago de la Spirito. (...)

La kono de la vero estas antaŭ ĉio la sentado de la graco. (...)

Esti sensente ekivalentas morton. Kaj esti spirite blinda estas kiel ne vidi en sia korpo. Unu estas senigita je la fakulto vivi kaj agi. Kaj la alia, kiu ne vidas, estas senigita je la dia lumo...

Pri Hesikio¹ kaj preĝo

Se ni volas trovi kaj koni la veron (...), ni nur serĉu en ni la energion de la koro, ekster ĉia figuro kaj ĉia formo. (...) Ni atentu nur la energion de la preĝo kiu agas en la koro, kiu varmigas kaj ĝojigas la spiriton [πνεῦμα], kaj flamigas la animon per nepri-skribebla amo al Dio kaj al la homoj. (...) Ĉe la komenco, tiu energio estas kiel ĝoja fajro kiu suprenvenas de la koro. Ĉe la fino, ĝi estas kiel lumo (...)

Jen la signoj de la komenco por kiuj vere serĉadas ĝin. (...) Ĉe iuj ĝi manifestiĝas kiel aŭrora lumo. (...) Ĉe aliaj, ĝi estas ĝojo. (...) Ĉe aliaj, ĝojo tremado. (...) Ĉe ankoraŭ aliaj, ĝi estas nerezisteblaj amo kaj paco.

(El *La Philocalie* [Φιλοκαλία], DDB/Lattès, 1995, vol. II, p. 378 kaj 412).

La heliantoj de la *starets** Kiriakos

Rakonto el la rusa tradicio monaĥa aŭ : pri senlibra maniero de lernado

La plej multaj artaĵoj – pentraĵoj, skulptaĵoj, poemoj – el la mezepoko, certe el la plej frua periodo, estas transdonitaj al ni anonime ; ankaŭ de sennombraj ikonoj el la mondo de la kristana Oriento, la nomo de la pentristo estas nekonata al ni. La samon ni povas konstati rilate al jena rakonto, kiu devenas el la monaĥa tradicio de la sankta Ruslando. Estas eĉ ne tute klare, kie ni situigu ĉi tiun rakonton. Ĉu ĝi havas sian lokon en la tiom riĉa deknaŭa jarcento de la rusa monaĥismo kun ĝiaj centroj kiel Optino, Valaam aŭ la fama monaĥejo Pantalejmenon en la duoninsulo Atos-montaro ? Kiu kapablas certe respondi ? Kiel ajn estu, la rakonto laŭ miaj informoj antaŭ nelonge "elmergiĝis" en Germanio. Eble interesos vin mia prilaboro, kiun mi faris speciale por ĉi tiu kongreso¹ (ni ja estas en la lando de la heliantoj !), serĉante por tiu celo du barbulojn aĝan kaj malpli aĝan. Frato Marmou² interpretos la voĉon de la *starets*-o³ kaj Christian Lavarenne tiun de la juna monaĥo. La tria rolulo estas la rakontanto⁴ [kaj tradukinto].

1/ *Ekumena kongreso* en Viviers (Francio), en julio 1993. (Vidu en n-ro 18 la tekston de unu el la tieaj prelegoj).

2/ Esperantista religiulo, tiam redaktoro de *Franca Katolika Esperantisto* ; la spektaklo ne realiĝis.

3/ Aĝa, saĝa monaĥo, kiu ekzemple kaj instrue enkondukas junajn monaĥojn kaj eĉ laikojn en la spiritan vivon.

4/ **Jacques Tuinder**, respondeculo de la porblindula agado "E3" kaj red. de ties *La informletero de Evidente*.

La staretso Kiriakos loĝis proksime al la rando de granda arbaro. Kiel la plej multaj homoj de tiu ĉirkaŭaĵo li vivis tre simple, preskaŭ povre. Tamen lia kabano estis fortike kaj zorge konstruita. En la mezo troviĝis hejtilo, kie li pretigis siajn ĉiutagajn manĝojn. La bezonatan manĝilaron li orde stokis sur la bretoj ĉemuraj.

Ĉiuj uzo-objektoj kiujn Kiriakos bezonis en la daŭro de la jaro, staris aŭ pendis prenprete laŭ la vandoj : sakoj, bareloj, rimenoj, ŝnuroj, najloj, salikaj branĉetoj, lignaj kestetoj, argilaj pladoj kaj kruĉoj. Profesie li estis korbofaristo, sed ŝatokupe li kulturis heliantojn (= sunfloroj). Kaj da ili li rikoltis sufiĉe por siaj manĝoj kaj por la oleolampetoj pendantaj antaŭ la paperaj bildoj de sanktuloj en lia loĝejo. Ofte li povis eĉ vendi nebezonatan parton...

Kvankam la staretso loĝis fore kaj izolite, proprainciate irante al neniŭ, li tamen ne estis soleca, kiel oni facile povus supozi. Kompreneble, de tempo al tempo li vojaĝis al la urbo por vendi siajn korbojn kaj restaĵojn de la rikolto. La homoj en la najbaraĵo konis lin kiel viron saĝan kaj pian. Dum multe da jaroj ili estis spertintaj la bonfaron, povi paroli kun homo de Dio pri siaj zorgoj aŭ peti konsilon kiel solvi malfacilan problemon. Aŭskultante la homojn li ofte ne interrompis sian laboron, kiam ili parolis al li. Kaj poste donante respondon, li diris nur tre malmulte. Tamen ĉiu reiris de li kiel homo konsolita, senpezigita kaj iumaniere liberigita.

Iun tagon – la staretso ĵus fortranĉis la elstarantajn salikbranĉetojn – ombro falis super lian manon kaj la korbon kiun li estis plektanta.

Li levis siajn okulojn kaj vidis antaŭ si junan viron kiu aspektis laca kaj faris impreson necertan. Afanasij – tia estis lia nomo – afable lin salutis. Kaj tiam komenciĝis jena dialogo :

– Mi same salutas vin, mia filo. De kie vi venis kaj kien vi intencas iri ?

– Mi venis el la Nordo, patra moŝto. Sed diru al mi : ĉu vi eble estas la respektinda Kiriakos ?

– Jes, mi nomiĝas Kiriakos.

– Mia nomo estas Afanasij, kaj se vi deziras scii kien mi intencas iri, nu, mi tre volonte dezirus resti ĉi tie, se tio al vi plaĉus. Mi serĉadis vin kaj jam longe survojas.

– Sed kion do vi volas fari ĉe mi ?

– Mi dezirus fariĝi via disĉiplo, ĉar mi aŭdis ke vi estas homo pia kaj saĝa.

– Kaj kion vi opinias pri vi mem ?

– Hm, mi ne precize scias. Ofte mi konsideras min prudenta, sed supozeble mi tiam eraras. Mi estas monaĥo.

– Kial do vi ne restis en via monaĥejo ?

– Mi serĉadis saĝecon kaj piecon, kaj tie mi ne trovis ilin. Mi tiam petis permeson eliri por serĉi kiel vaganto kaj trovi ilin aliloke.

Kiriakos silentis. Afanasij do daŭrigis :

– Mi deziras peti al vi disĉiple akcepti min kiel instruotan junan monaĥon.

– Nu, restu ĉe mi, en la nomo de Jesuo, tiom longe kiom vi pensas tion necesa.

– Mi vin dankas, Patra Moŝto. Ĉu mi eble povus iom helpi al vi en la laboro ?

– Jam vesperiĝas, kaj la laboro povas atendi ĝis morgaŭ. Ni do nun ekpreĝu kune !

Kiel la aĝa monaĥo estis simpla en siaj laborado kaj vivmaniero, tiel same en sia preĝado. Li amis la Sinjoron Jesuon kaj rilatis kun Li fidoplene ĉar ankaŭ Li iam estis malriĉa kaj vivis de la laboro de Siaj manoj. Kaj ĉar Jesuo en la teraĵoj estis vidinta parabolojn pri la ĉielajoj, por li ne estis malfacile ĉiutage laŭdkanti.

La monaĥo Afanasij do restadis ĉe patro Kiriakos. Li pretigis la simplajn manĝojn laŭ la indikoj de la majstro, prizorgis la kaprinon, tranĉis la salikbranĉetojn, riparigis se necese la kabanon kaj montris sin vere komplezema kaj kapabla por ĉiu laboro. Kiam la staretso preĝis, li fervore klopodis same kore kaj arde eldiri la preĝojn. Kvankam li estis nepre kontenta pri ĉi tiu vivo, oni tamen povis kelkfoje rimarki ĉe li ian malĝojon, similan al liaj monaĥejaj spertoj. Afanasij pensis en si mem, ke tion kaŭzis la fakto ke li ne facile povas vivi en paco kun siaj ĝisnunaj atingoj : homoj ne kvietigis ĝis ili estos trovintaj tion kio donas al ilia animo ripozon kaj trankvilon.

Iu tagon ambaŭ sidis ekstere sur benko kaj okupis sin pri siaj propraj pensoj. Afanasij profunde ĝemis. Kiriakos demandis lin :

- Pri kio vi pensas, mia filo ? Kio igas vin ĝemi tiel profunde ?
- Ho, mi pensas pri tio, ĉu mi bone agis veninte al vi por fariĝi via disĉiplo.
- Ĉu vi nenion lernis de post via alveno ĉi tien ?
- Mi ĉiutage atendas kiam vi komencos vian instruon, sed vi tion ne faras. Vi ne montras al mi librojn el kiuj vi lernis ...aŭ ĉu vi ne havas librojn ?
- Tre malmultajn. Estas pli simple agi sene.
- Mi ne serĉas tion kio estas plej facila.
- Estas pli simple sen libroj. Mi do ne diras ke tio estas pli facila.
- Pardonu min ; mi ne bone aŭdis vin.
- Ĉu vi vere opinias ke vi nenion lernis ? Ĉu vi do ne fariĝis iom pli pacienca kaj pripensema ?
- Tio certe eblas. Sed por mi tio estas tro malmulta. Vivo ŝajnas al mi tiel mallonga kaj altvalora... En tio vi ja nepre samopinias kun mi !
- Sendube !
- Mi povas malfacile elteni, vidante ke pasas la tagoj sen ke mi esence eniras la kernon de la vero.
- Ĉi tio tamen okazas. Eĉ ĉiutage !
- Ĉu vi ne povas ekspliki al mi ?
- Ne, Afanasij, tion vi lernu alimaniere ; tion vi faru per viaj manoj kaj piedoj, per via tuta korpo, per via animo, ne nur via kapo kiel vi ŝajne pensas.
- Mi opinias la kapon nepre tre grava en tio.
- Se vi kaptis iun aferon ekskluzive per la kapo vi apenaŭ ekkomprenis ĝin.
- Mi ne bone komprenas vin, patro.

- Tio ne gravas ĉar povos sekvi morgaŭ. Vi nun iru al la kampo kaj eltiru la troajn herbojn de inter la heliantoj. Poste mi demandos al vi kion vi lernis.

- Jes, patro, kaj mi promesas al vi konduki kiel diligenta disĉiplo. Mi faros mian plejebulon por kompreni ĉion kaj teni en la memoro kion vi instruas al mi.

- Kompreni kaj memorteni, Afanasij, jen la malbono de la homoj ! Ĉion ili deziras kompreni kaj firme teni. Vi devas lasi. Tio estas multe pli necesa. Lasi, kiel lasis Sian naturon kaj lernis obei kiel homo nia Sinjoro Jesuo Kristo ; Kiu posedas ĉiun kaj ĉion kaj lasis amikojn, samtempe lernante kio estas malriĉeco ; kaj Kiu finfine lasis Sian vivon por sole teni ĉion tenindan. Diru al mi, mia filo, kio estis en Lia vivo, kion Li tenis kaj per kio Li mem estis firme tenata ?

- Mi timas ke, respondi al tio, mi ne kapablas !

- Nu, tio estis amo al Dio kaj la ligno de Lia kruco. Ĉu vi nun kredas ke por tion lerni, estas bezonata pli ol nur kapo ? Iru do nun eksteren, al la heliantoj, kaj lernu de la kampo tion kio por vi estas ege peniga.

La monaĥo stariĝis kaj direktis sin al la laboro. Li diligente streĉis siajn fortojn, sed al la demando de Kiriakos ĉu li estis lerninta ion ĉi tiun tagon, li devis ne respondi. Li sentis sin laca kaj malsata. Kaj la postan tagon li denove - sen multe da espero - eliris por sarki. Vespere ĉio restis la sama, kaj sekve kreskadis lia deprimeco. La trian tagon Kiriakos invitis lin sammaniere daŭrigi sian laboron. Ŝajnis al Afanasij ke la suno estas kvazaŭ elĉerpita maljunulino kiu apenaŭ kapablas antaŭeniri sur sia vojo, eble eĉ tute ne atingos sian celon. Sed finfine ĝi tamen estis pasiginta sian vojaĝon. Kaj la juna monaĥo povis iri hejmen. Doloris lia dorso, vundruĝetis liaj manoj, sed ankoraŭ pli brulis lia koro, ĉar nun li havis ion komunikindan al sia majstro. Kiriakos demandis lin :

- Nu, mia filo Afanasij, ĉu vi hodiaŭ ion lernis ?
- Jes, patro, hodiaŭ mi vere lernis ion.
- Mi aŭskultas.
- Jam tri tagojn mi eltiras la troajn herbojn el la tero. Mi nun lernis ke la tero nur kontraŭvole lasas ilin. Mi devis uzi perforon. Estas malfacile adiaŭi tion kun kio oni estas kunkreskinta, estu ĝi la bono aŭ la malbono. Tio estas trankviliga kaj kuraĝiga.
- Tion vi bone lernis, Afanasij.
- Mi ankoraŭ ne finparolis. De la tero mi krome lernis ke mi estas sama kiel ĝi. Mi povas ĉiutage reiri al ĝi. Ĝi akceptos min kiel patrino kaj enkaŝos min. Ĝi faros mian nomon kaj mian personon kia ĝi mem estas.
- Vi ne vane lacigis vin ĉi tiujn tri tagojn. Ĉu vi pretas morgaŭ denove eliri por lerni de la heliantoj ?

Dum longa tempo ne pluvis. Tial Afanasij devis akvumi la heliantojn. La floroj estis ekburgonontaj kaj bezonis ekstremojn da akvo. De horo al horo li trenadis la barelon de la fonto al la kampo por elverŝi la akvon ĉe la radikoj. La staretso demandis lin vespere kion li estas lerninta, sed li tuj vidis laŭ la laca kaj deprimita sinteno de la monaĥo, ke pliaj demandoj superfluis. Ĉi tiun fojon, daŭris eĉ kvar tagojn, antaŭ ol li sukcesis eldiri vorton.

Sed finfine : – Hodiaŭ mi tre dankas al Dio, ke Li sendis min al vi kiel mia instruisto.

– Do, ĉu vi denove lernis ion ?

– Jes ja, aŭskultu ! Mi lernis de la heliantoj, ke ĉio originas el la mezo por malrapide kaj egale disfaldiĝi. Kaj mi malkovris ke en la simpla kreskado kaj longa silentado de la floroj loĝas granda forto.

– Tion vi bonege ekkomprenis !

– Mi lernis de la floroj ankaŭ la jenon : ke ĉiu libereco disvolviĝas en ligiteco. Kiel la flavaj petaloj ĉirkaŭas la semokernon, tiel la monaĥoj staras ĉirkaŭ la Sinjoro Jesuo.

– Ili obeante rezignas pri vivo neligita kaj tial povas kreski, flori kaj prosperi. Ili montras al la koro de la homo la mezon, kiu estas nia Sinjoro Jesuo.

– Amen ! ...Konsekvence mi erare agis forlasante la ĥorejon de la monaĥoj.

– Nu do, vi estas kiel aparta kaj unuopa petalo, kaj ne tre rapide okazos kiam alia homo per vi pensos pri la mezo el kiu li mem originas.

– Vi parolas la veron, patro !

Per la helpo de Afanasij Kiriakos estis plektinta, pli frue ol kutime, sufiĉan nombron da korboj, kaj li decidis iri al la urbo por vendi ilin tie. La monaĥo stokis, dum lia majstro alrigardis, la korbojn sur la krude ĉarpentitan ĉaron, kaj la postan tagon ili frue foriris, kiam ili estis manĝintaj kaj kunprenintaj iom por nutri sin survoje.

La laciga ĉarveturado al la urbo daŭris plurajn horojn. Sed Patro Kiriakos estis konata tie kaj ne bezonis longe atendi la intereson de la aĉetontoj. Ne malmultaj homoj volonte ŝatis iom paroli kun la aĝa monaĥo kaj tiel do estis agrable ambaŭflanke, ke Afanasij povis transpreni grandparte la komercajn aferojn. Tamen Kiriakos forsendis la monaĥon en la frua posttagmezo por fari diversajn aĉetojn.

Kiam li estis sola kun siaj korboj, viro alpaŝis al li, demandante kiu estas tiu juna viro kiu lin akompanas. La staretso respondis ke tiu estas Afanasij, lia disĉiplo. La fremdulo komence diris nenion kaj rigardis, sed poste li turnis sin al Kiriakos, dezirante aŭdi ĉu li scias iom pri li. La majstro trankvile respondis la esplorantan rigardon kaj jese diris : "Mi scias de kie venis Afanasij kaj kiu li estas".

Konekse la fremdulo rakontis al li ke Afanasij apartenas al kunfratoj liaj kaj ke li estis surprizita vidi lin en lia societo. Kiriakos aŭdis plie, ke la alparolanto nomiĝas Simono kaj ke li estis en bonaj amikaj rilatoj kun Afanasij. Simono estis faranta sian plejblon kompreni sian kunfraton kaj liberigi lin de troa cerbumado. Bedaŭrinde li ne estis sukcesinta lin teni ĉe si. Pri tio Simono estis ĉagrenita kaj li demandis al Kiriakos ĉu li opinias la revenon de Afanasij ebla kaj ĉu li povos adapti sin al la peza monaĥeja vivo. Li ne kapablis toleri maljustaĵojn nek hazardan malantaŭenigon. Aliflanke tamen, Afanasij estis de bona volo kaj vere bona homo, kun kiu li tre kore simpatiis. Dum la interparolo Kiriakos skuadis sian dubantan kapon.

Simono finis demandante ĉu la staretso deziras instrui la junan monaĥon tiom longe kiom li volas restadi ; li mem en sia loko preĝados por li. Poste li adiaŭis, feliĉa kaj ĝoja ke li denove trovis spuron de sia amiko. Afanasij revenis hejmen, tre kontenta pri la tago kiun li pasigis en la urbo.

Kiam alvenis la tempo por rikolti la heliantojn, Kiriakos petis al la monaĥo alporti unu heliantan kerneton en la kabanon.

– Jen la kerneto, patro, kiun vi petis al mi.

– Tio estas bona ; bonvolu zorge meti ĝin en la fendon de la muro.

– Ĉu estas speciala kerneto ?

– Nu, tia ĝi eble ne estas !

– Sed mi metu ĝin en tiun fendon de la muro ?

– Jes, tion mi petis al vi.

– La ĉi tiea vivo ekstere ĉe vi, patro, estas belegra. Vi instruas min, kaj ĉio estas tiel simpla, tiel mistera ankaŭ. Al mi tre bone plaĉas ! ...sed diru al mi kio okazos al tiu kerneto ?

– Kio okazos al ĝi ? Nenio !

– Sed, patro Kiriakos, ĉu vi serioze opinias tion ?

– Jes, certe.

– La kerneto sekiĝos, kaj elprenante ĝin vi ĝin semos en la venonta printempo.

– Eble.

– Aŭ vi povos planti ĝin antaŭ la kabano, kaj rememoros la monaĥon Afanasij, kiam li ne plu estos ĉe vi.

– Pri tio mi ankoraŭ ne pensis, sed estas bona ideo. Tre povas esti ke mi tion faros !

– Vi do vere nenion celis aŭ intencas entrepreni per la kerneto de la sunfloro ?

– Ne ! Sed mi deziras ke vi faru ion per ĝi.

– Ĉu mi, patro ?

– Jes, certe, vi. Vi ja venis al mi por lerni ?

– Pardonu al mi, sed vi kelkfoje estas malfacile komprenebla instruisto.

– Ĉu estas tiel malfacile rekoni en tiu apartigita kerneto vin mem ?

- Min mem ? Kiel do ?
- Vi tenas vin ĉeflanke, kiel la kerneto en la fendo de la muro.
- Vi plene pravas.
- Ĉu tio estas bona destino por kerneto ?
- Fakte ne ! Ĝi devas esti elpremata kune kun la aliaj por ke oni ekhavu de ĝi oleon.
- Kaj tiam ĝi estas bruligata kiel oleo kaj donas helan lumbrileton.
- Nun mi komprenis vin, patro Kiriakos. Sed mi ne volas eniri kun la aliaj en la premilon.
- Kaj ne elteni frotadon kaj premadon de aliaj.
- Ne, ankaŭ tion mi ne volas !
- Tial la kerneto provizore havos sian lokon en la tiea fendo de la muro.

La helianta kerneto sekve restadis en la sama loko, kaj Afanasij poste ne plu pensis pri ĝi. Li forgesis la aferon. Iun tagon, tamen, lin surprizis ke li staras antaŭ la muro kaj rigardas la kerneton. "Ĉu mi vere estas kiel ĝi ? Ho, kiom ridinde ! Kio povus esti pli stulta ol kerneto de helianto ?"

Sed ek de nun la pensado pri la kerneto des pli ofte leviĝis en lia kapo, ju pli li klopodis ĝin forgesi. Kiam li devis plenigi la lampeton per oleo, li cerbe kalkulis kiom da kernetoj estas dispremitaj por ekhavi ĉi tiun oleon. Ili silente eltenis ĉion. Se ili ne estus eltenintaj, jes ...tiam ĉie estus mal-lume antaŭ la bildoj de la sanktuloj en tuta Ruslando, tiam estus obskure en ĉiuj preĝejoj...

Li interkonsiliĝis kun si mem, ĉu li eble petos sian majstron planti la kerneton sur la kampo aŭ antaŭ la pordo, tiel ke ĝi ne bezonos trairi la premilon. Sed kiam li tiel pripensis la aferon, li tuj ekkonsciis pri tio ke la kerneto formortos ankaŭ tie. Lia koro pleniĝis per demandoj. Li sentis sin ĉe patro Kiriakos same malfeliĉa kiel dum la lasta tempo de sia restado en la monaĥejo.

- Vi perdis viaŭn gajecon. Ĉu vi estas malsana ?
- Mi ne scias. Eble.
- Ĉu vi opinias povi ankoraŭ lerni ion ĉe mi ?
- Mi ne scias. Kial vi demandas tion ?
- Preterpasas la tempo. Venos la vintro. Tiam ĉe mi apenaŭ estos ion por fari. Sed se vi opinias ke vi povos ankoraŭ ion lerni, vi restu !
- Patro Kiriakos, la lastan tempon mi ade pli emas ensakigi la kerneton el la muro ĉe la aliajn.
- Kial do vi ne faris tion ?
- Tion mi demandas ankaŭ al mi mem. Mi serĉadis saĝecon kaj piecon. Ĉe vi mi trovis ilin, sed mi nun komprenas ke mi devos komenci ankaŭ vivi konforme al tio kion mi lernis...
- Kial vi hezitas ?
- Mi malkovris ke ĉe vi estas same malfacile tion fari kiel en la monaĥejo. Eble mi ne povis trovi ilin tie ĉar mi ne volis praktike laŭvivi.

- Se vi tion ekkomprenis vi trovos ilin ankaŭ tie !
- Se mi havas mian lokon en la monaĥejo, kiel la petalo de floraĵo, tiam mi devos reiri.
- Ĉiuj vin atendas, via loko estas ankoraŭ libera.
- Sed estas tiel malfacile ! Kiam mi reiros mi ne nur aliĝos al miaj fratoj kiel la petalo al la floraĵo, sed mi ankaŭ eniros kiel la kerneto en la premilon : mi estos disŝirata, platigata, elpremata kiel la kerneto. Kaj tion travivi mi ne volas. Kion vi opinias ?
- Vi pravas, sed ĉio ĉi tamen fariĝu al vi.
- Kial do ĉio ĉi ?
- Por provi doni lumon. Ĉu tio estas tiel malfacile komprenebla ? Pripensu kiom altvaloras ununura lumo en la malluma vintro, kiom necesas flamo varmiganta. La kerneto en la tiea muro donas nek lumon nek varmon.
- Se mi ne reiros, mi restos aparta. Por neniu mi estas utila. Al neniu mi donas lumon, varmon aŭ ĝojon. Sed, kiu scias ? eble aŭtomate io ŝanĝiĝos.
- Ne, aŭtomate nenio ŝanĝiĝos. Vi devos decidi.

Ek de tiu momento en la monaĥo ade viglis la penso. Ĉio turniĝis ĉirkaŭ la kerneto : aŭ morti, doni lumon, renoviĝi, kreski, flori, porti fruktojn ; aŭ kuŝi flanke, resti nekonsumita, nedifektita, neuzita, senutila, senvalora, putrita, forgesita.

La staretso preĝis kaj parolis kiel kutime nur modere. Ankaŭ Afanasij preĝis ...antaŭ la bildoj de la sanktuloj kun la briletantaj lampetoj.

Kaj kiam li preĝis en la nokta mallumo, el sia tuta koro, li subite sentis la malgrandan flamon klare kaj varme heliĝi en sia interno. La malgranda lumo forpelis liajn senlumajn, senkuraĝajn pensojn, kaj klare-kviete li ekkomprenis kion li faru. Li dankis Dion kaj kuŝiĝis por dormi.

Je aŭrora horo li vekiĝis, ellitiĝis kaj pretigis sin por foriri. Tiam el la cindro li iom incitis la flametojn, surmetis branĉetojn kaj lignon kaj blovbruligis la fajron. Kiam la unuaj flamoj spirale turniĝis supren, li prenis la heliantan kerneton el la fendo de la muro kaj metis ĝin singarde en tiun malgrandan fajron. Li alrigardis kiel la ardo kaptis ĝin kaj kiom ĝi dum tre mallonga momento ekheliĝis. Kiam la kerneto estis forbruligita, li direktis sin al la kuŝejo de la majstro. "Mi ĵetis la kerneton en la fajron kaj ĝi donis lumon", li diris. Kaj : "Mi dankas vin, Patreto, fartu bone !" La staretso ĝemis, kaj ne evidentis ĉu tio okazis en lia dormo aŭ ĉu li estis rimarkinta la monaĥon.

Afanasij senbrue malfermis la pordon por ne eldormigi la aĝan kunfraton kiu estis montrinta al li la vojon. Tiam li avide enspiris la malvarman matenan aeron. Li restis momente staranta kaj tuj poste eniris la vojon al la Nordo. □

El *Benedictijns Tijdschrift*, 1986/1, adaptis J. Tuinder.

Propono de rezolucio pri Esperanto al la IARF Ĝenerala Konferenco



La ĉefe angla-uzanta *Internacia Asocio por Religia Libereco* (IARF) mond-kongresas ĉiun trian jaron. En 1993 en Bangaloro (Bharato), ĝi akceptis ASISTI-on kiel (asociitan) grupon-membron. Ĉi-jare ASISTI provas ekakceptigi Esperanton mem dum ĝia Mond-Kongreso en Vankuvero. Jen la **subteninda** propono.

La IARF Ĝenerala Konferenco,

akceptante la rekomendon de UNESKO "al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj [NROj] (...) *pri-studi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn*" (Ĝenerala Konferenco en Sofio, 1985) ;

notante ke, ĉe la celebrado en 1993 en Bangaloro de la centa datreveno de la Monda Parlamento de Religioj, unu el la "idealaj perspektivoj de interkreda kunlaboro" estis: "*ĉiu havas duan komunan lingvon (Esperanto), tiel estas pli granda interkompreno*". (Celia kaj David Storey, *Visions of an Interfaith Future: Proceedings of Sarva-Dharma-Sammelana*, Oxford: **International Interfaith Center**, 1994, p. 65, § 10.11) [vidu *Asistilo* n-ro 17, p. 5] ;

konsentante kun la Ĉefmajstro de **Ŭonbudhismo (IARF-membro grupo)**, kiu diris, ĉe WCRP-celebrado de la UNO-jubileo, la 22-9-1995 en Nov-Jorko, ke "*necesas adopti komunan lingvon akcepteblan al ĉiuj homoj de la mondo*" [vd *Asistilo* 19],

kaj kun la **Bahaa Internacia Komunumo** kiu proponis al UNO "la dungon de altnivela Komisiono (...) por komenci zorgan studon pri la demando de **internacia helplingvo** (...) por faciligi la transiron al monda socio per pli bona komunikado inter nacioj (...) kaj ĝeneralan firmigon de pli koraj rilatoj inter membroj de la homa familio" (*Turning point for all nations*, New York: United Nations Office, october 1995, p. 9-10 ; trad. ASISTI) ;

salutante la fondon, la 8-an de majo 1997 en Novjorko, de neformala **Koalicio de Ne-Registaraj Organizaĵoj por Internacia Help-Lingvo**, en kiu jam partoprenas jenaj religiaj NRO-j : Ŭonbudhismo (IARF-membro grupo), La Templo de Kompreno, la Bahaa Internacia Komunumo kaj la Mond-Paca Preĝ-Societo ;

aŭskultinte la idealisman kaj nelacigeblan alvokon de s-ro **Jaroslav Karhan** al UNESKO (1995), al ASISTI (E-uzanta IARF-membro asociita) [vidu *Asistilo* 18, p. 30], kaj fine al IARF mem en 1998, instrui "Hom-Ekologion", t.e. Esperanton kaj universalan etikon, en la lernejoj de la tuta mondo ;

dezirante fari konkretajn paŝojn por jam parte **ekrealigi** la "*Religian postulon krei Mondan Komunumon*" [temo de la ĉi-jara IARF-kongreso] ;

1/**subtenas** kaj **intencas** aliĝi al la neformala Koalicio de Ne-Registaraj Organizaĵoj por Internacia Help-Lingvo ;

2/**decidas** partopreni en ties speciala kunveno ĉe la Konferenco de la UN-aj internaciaj neregistaraj organizaĵoj (CONGO) en Seulo, de la 11-a ĝis 16-a de oktobro 1999 ;

3/**petas** la Ĝeneralan Sekretarion pristudi la eblecojn ke IARF uzu esperanton :

- dum siaj venontaj kongresoj, aldone al la jam uzataj Kongresaj lingvoj ;
- tradukante parton de sia informa materialo ;
- kaj dediĉante unu paĝon de sia organo *World* al esperantlingvaj tradukoj aŭ resumoj de la angla-lingvaj artikoloj ;

4/**invitas** la IARFmembrojn-grupojn kaj asociitajn membrojn :

- esplori ĉu inter iliaj membroj jam estas kelkaj E-parolantoj, kaj kuraĝigi ilin iel grupiĝi kaj servi kiel perantoj de sia grupo al la aliaj membroj-grupoj per tradukoj de kaj al esperanto ;
- instigi siajn membrojn eklerni esperanton, tiel ke ili aliĝu al aŭ fondu E-fakan grupon ene de sia movado, laŭ la modelo de ŬEA fondita en 1980 kaj tradukinta (...) *La Sankta Instruo de Ŭonbulismo* (417 p., 1998), kaj ke ili abonu kaj kontribuu al *Asistilo*, E-lingva revuo pri kompara religio ;
- aliĝi al la neformala Koalicio de Neregistaraj Organizaĵoj por Internacia Help-Lingvo kaj partopreni en ties speciala kunveno ĉe la Konferenco de UNaj NROj (CONGO) en Seulo (11/16-10-1999).

Amsterdama Eŭropa Kunveno *

La kunveno organizita de IARF (9/11-4-1999) efektive estis pli malformala kunveno, celanta interkonigi aktivulojn pri interreligia dialogado k.s., ol fonda kunsido pri tegmenta organizo aŭ simila.

Aliflanke, estis tre bona kunveno. Bonetosa. Relative multe da variado : **23 homoj**, el almenaŭ Finnlando, Egiptio, Israelo, GB, RO, ES kaj NL ; kristanoj plurekleziaj (liberalaj, remonstrantaj, rus-ortodoksia, unitarianaj, reformita, protestantaj), islamanoj, judo, bahaanoj, membroj de aliaj movadoj : WCRP, Brahma-Kumaroj, *Movimento Universalista Nueva Era*, *Logos*, ktp. Entute bunta aro.

Mi multe kaj serioze **informis kaj pri ASISTI kaj pri E-o** ; kelkaj eĉ notis adresojn sialande por ekkontakti esperantistojn. La IARF-homoj sciis ke ASISTI estos reprezentata Vankuvere, de C. Jauca.

* Vidu n-ro 22, p. 31. **Gerrit Berveling**

Jogosutro de Patañjali :

हेयं दुःखमनागतम् ॥ १६ ॥
द्रष्टृदृश्ययोः संयोगो हेयहेतुः ॥ १७ ॥
प्रकाशक्रियास्थितिशीलं भूतेन्द्रियात्मकं
भोगापवर्गार्थं दृश्यम् ॥ १८ ॥

heyam duḥkham an-ā-gatam // 16 //
draṣṭṛ-dṛśyayoḥ saṁyogo heya-hetuḥ // 17 //
prakāśa-kriyā-sṭhiti-śīlam bhûtēndriyâtmakam
bhogâpavargârtham dṛśyam // 18 //

दुःखमतीतमुपभोगेनातिवाहितं न हेयपक्षे वर्तते । वर्तमानं च स्वक्षणोपभोगारूढ-मिति न तत्क्षणान्तरे हेयतामापद्यते । तस्माद्यदेवा-नागतं दुःखं तदेवाक्षिपात्रकल्पं योगिनं क्लिप्तनाति नेतरं प्रतिपत्तारं, तदेव हेयतामापद्यते । तस्माद्यदेव हेयमित्युच्यते तस्यैव कारणं प्रतिनिर्दिश्यते ॥ १६ ॥

द्रष्टृदृश्ययोः संयोगो हेयहेतुः । द्रष्टा बुद्धेः प्रतिसंबन्धी पुरुषः । दृश्या बुद्धिसत्त्वोपाहृताः सर्वे धर्माः । तदेतद् दृश्यमयस्कान्तमणिकल्पं सन्निधिमात्रोपकारि दृश्यत्वेन स्वं भवति पुरुषस्य दृशिरूपस्य स्वामिनः ।

अनुभवकर्मविषयतामापन्नं यतोऽयःस्वरूपेण प्रति-पन्नमन्यस्वरूपप्रतिलब्धात्मकं स्वतन्त्रमपि परार्थ-त्वात्परतन्त्रम् । तयोर्दृग्दर्शनशक्त्योरनादिरर्थकृतः संयोगो हेयहेतुर्दुःखस्य कारणमित्यर्थः ।

तथा चोक्तम् — "तत्संयोगहेतुर्विवर्जनात्स्यादयमात्य-न्तिको दुःखप्रतीकारः ।" कस्मात्? दुःखहेतोः परिहार्यस्य प्रतीकारदर्शनात् । तद्यथा पादतलस्य भेद्यता कण्टकस्य भेत्तृत्वं परिहारः कण्टकस्य पादानधिष्ठानं पादत्राणव्यवहितेन चाधिष्ठानम् ।

एतत्त्रयं यो वेद लोके स तत्र प्रतिकारमारभ-माणो भेदजं दुःखं नाप्नोति । कस्मात्? त्रित्वो-पलब्धिसामर्थ्यादिति ।

अत्रापि तापकस्य रजसः सत्त्वमेव तप्यम् । कस्मात्? तपिक्रियायाः कर्मस्थत्वात्सत्त्वे कर्मणि तपिक्रिया नापरिणामिनि निष्क्रिये क्षेत्रज्ञे दर्शित-विषयत्वात् । सत्त्वे तु तप्यमाने तदाकारानुरोधो पुरुषोऽनुत्पद्यत इति ॥ १७ ॥

प्रकाशशीलं सत्त्वम् । क्रियाशीलं रजः । स्थितिशीलं तम इति । एते गुणाः परस्परपरकतप्रविभागाः परिणामिनः संयोग-वियोगधर्माण इतरेतरोपाश्रयेणोपाजितमूर्तयः परस्प-राङ्गाङ्गित्वेऽप्यसंभिन्नशक्तिप्रविभागाः ।

duḥkham atītam upabhogenâtivāhitam na heya-pakṣe vartate / vartamānam ca sva-kṣaṇôpabhogârūḍham iti na tat-kṣaṇântare heyatām âpadyate / tasmâd yad evânâgatam duḥkham tad evâkṣi-pâtra-kalpam yoginam kliṣnâti netaram prati-pattâram tad eva heyatām âpadyate / tasmâd yad eva heyam ity ucyate tasyaiva kâraṇam prati-nirdiśyate // 16 //

draṣṭâ buddheḥ pratisaṁvedī puruṣaḥ / dṛśyâ buddhi-sattvôpârūḍhâḥ sarve dharmâḥ / tad etad dṛśyam ayas-kânta-maṇi-kalpam sannidhi-mâtrôpakâri dṛśyatvena svam bhavati puruṣasya dṛśi-rûpasya svâminah /

anubhava-karma-viṣayatām âpannam yato 'yaḥ sva-rûpeṇa prati-pannam anya-svarûpa-pratilabdhatmakam sva-tantram api parârthatvât para-tantram / tayor dṛg-darśana-śaktyor an-âdir artha-kṛtaḥ saṁ-yogo heya-hetur duḥkhasya kâraṇam ity arthaḥ /

tathâ cōktam "tat-saṁyoga-hetur vivarjanât syâd ayam âty-antiko duḥkha-pratī-kâraḥ" / kasmât ? duḥkha-hetoḥ parihâryasya pratī-kâra-darśanât / tad yathâ pâda-talasya bheda-ya-tâ kaṇṭakasya bheta-tṛ-tvam parihâraḥ kaṇṭakasya pādânadhiṣṭhânam pâda-trâṇa-vyavahitena câdhiṣṭhânam /

etat trayam yo veda loke sa tatra prati-kâram ârabha-mâṇo bheda-jaṁ duḥkham nâpnoti / kasmât ? "tritvôpalab-dhi-sâm-arthyâd" iti /

atrâpi tâpakasya rajasah sattvam eva tapyam / kasmât ? tapi-kriyâyâḥ karma-sthatvât sattve karmaṇi tapi-kriyâ nâpari-ṇâmini niṣ-kriye kṣetra-jñe darśita-viṣayatvât / sattve tu tap-yamâne tad-âkârânurodhī puruṣo 'nu-tapyata iti // 17 //

prakāśa-śīlam sattvam / kriyâ-śīlam rajaḥ / sṭhiti-śīlam tama iti / ete guṇâḥ parasparôparakta-pravibhâgâḥ pariṇâ-minah saṁ-yoga-vi-yoga-dharmâṇa itaretarôpâśrayeṇôpârjita-mûrtayah parasparâṅgâṅgitve 'apy a-sambhinna-śakti-pravi-bhâgâḥ (...) // 18 //

"Se vi havas ŝuojn vi povas trankvile paŝi sur dornoj. Ekipita per la kono de la realo, vi povas same sekure trapasi tiun ĉi dornan mondon." (El *L'enseignement de Râmakrishna* [1836-1886], Paris : A. Michel, 1972, p. 271.)

II – Ĉapitro de la *plenumado* (sekvo)

(*Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj*)

16. La venonta sufero estas evitebla.

17. Tiel, la konfuzo inter la spektanto kaj la vidaĵo estas kaŭzo evitebla.

18. La materia videbla mondo manifestiĝas per senmoveco aŭ aktiveco aŭ lumo. La naturaj elementoj kaj la sentumaj organoj komponas ĝin. La celo de tiu manifestado estas utiligo aŭ liberigo de ĝi.

(*Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito*)

16. Evitenda estas sufero kiu ne alvenis.

17. La kaŭzo de la evitenda [sufero] estas la kuniĝo de perceptanto kaj percepteblaĵo.

18. La percepteblaj[ar]o havas kiel naturon brilecon-ag[em]on-inercion ; ĝi konsistas el la estaj[ar]o [kaj] la sensoroj ; ĝi servas por ĝuo [aŭ/kaj] liberiĝo.

Sanskrita komentario de Vjaso

16. [Jam] pasinta sufero kiun, spertante ĝin, oni elportis, ne [plu] estas en la kazo de evitenda [sufero]. Kaj la okazanta [sufero], "kiu leviĝas el la spertado en la momento mem [kiam tiu ĉi okazas]", dum la momento de ĝi[a okazo] ne "falas" en la kategorion de evitenda [sufero]. Pro tio, **nur tiu sufero kiu ne alvenis turmentas¹ la joganon**, kiu estas simila al okulglobo [= tre sentema], ne alian vagulon ; nur tiu [sufero] "falas" en la kategorion de evitenda [sufero]. Pro tio, oni (retroe) montras la kaŭzon de nur tiu sufero kiu estas nomita "evitenda".

17. La perceptanto estas la "persono" spertanta el [sia] "konsciilo"². La percepteblaĵoj estas ĉiuj kvalitoj³ ĝis kiuj alvenas la konsciilo-spirito⁴. Tiu percepteblaĵo mem, simila al magneto, efikante nur pro proksimeco, ekrilatas per sia perceptebleco [mem] kun la "persono" (, la sŭamio⁵) kiun karakterizas la perceptado. Ĝi fariĝas objekto de la perceptado ; sekve ĝi ricevas sur sin la feron [= altiras la atenton de la perceptanto] per sia propra naturo ; ĝia esenco estas ricevi de alia sian propran naturon : eĉ sendependa, pro la fakto ke [ĝi fariĝas] objekto por alia [ĝi fariĝas] dependa de alia.

La senkomenca, celhavanta kuniĝo de la (du) povoj de la perceptado [kiun havas la spirito] kaj de la perceptilo [= senso] estas la kialo de "la evitenda", t.e. la kaŭzo de sufero. Kaj tiel, estas dirite :

"Pro ĝia evit[eblec]o, la kialo de ilia kuniĝo estu senfina [antaŭ]rimedo."

Kial ? **Pro la kompreno** de la [antaŭ]rimedo de la evitenda kialo de sufero. Laŭ jena ekzemplo : plando de **piedo estas vundebla** ; dorno estas vundiga ; **la evito estas** ne meti la piedon sur dornon aŭ **meti [ĝin] intermetinte piedprotektion** [t.e. ŝuon aŭ sandalon].

Kiu konas tiun ĉi trion en la mondo, tiu, apogiĝante sur la [antaŭ]rimedo, tiam ne spertos la suferon naskitan de vundo. Kial ? *"Pro la taŭgeco de la kompreno de la trio"*.

Ankaŭ ĉi tie, kie la pasio estas turmenta, nur la spirito estas turmentota. – Kial ? – Ĉar pri turmentado la ago okazas interne de sia objekto, [do] **la turmentado okazas en la spirito** [kiu estas ĝia] objekto, **ne en la senŝanĝa neaganta animo** [la "persono" (*puruŝa*) "kiu konscias la korpon"]. Sed kiam la spirito estas turmentata, la "persono", konformiĝante al la aspekto de tio, laŭe turmentiĝas.

18. (...) Brileco estas la naturo de la virto (*sattva*) ; ag[em]o, la naturo de la pasio (*rajas*) ; inercio, la naturo de la tenebro (*tamas*). Tiuj ĉi kvalitoj estas dividoj [de la realo], kiuj reciproke influas unu la aliajn ; ili estas ŝanĝiĝemaj [unu en la aliajn] ; ilin karakterizas ke ili estas [samtempe] kunigitaj kaj apartaj ; ili manifestiĝas per reciproka subteno ; kvankam ili estas reciproke membroj unu de la aliaj, ili estas "dividoj" de nefendita potenco. (...) □

1/ En n-ro 22 p. 19, 2-a kolumno, linio 25, (koment. de II,15), prefereble anstataŭigu "afliktas" per "turmentas".

2/ T.e. spirito ; kun sama radiko kiel tiu de la budho (*buddha*) : la "vekita", aŭ/kaj la "konscia".

3/ En la 1-a PIV-a senco : "ĉiu el la diferencaj manieroj, kiel objekto impresas siajn sensojn, kaj kiuj konsistigas ĝian (...) eksteron, karakteron".

4/ La hinda teorio pri perceptado estas la malo de la okcidenta : laŭ ĝi la sensoj ne ricevas pli malpli pasive la perceptojn alvenantajn de la ekstera mondo, sed aktive eliras el la enkorpora spirito ĝis la objektoj por preni la (sonaj, vidajn ktp.) informojn kiujn tiuj ĉi entenas. Anstataŭ "ĝis kiuj la spirito alvenas", okcidentanoj do male pensus : "kiuj alvenas ĝis la spirito".

5/ "Majstro" ; ĉi tie sinonima de "jogano".



Proponita Ĉarto de

Vi estas bezonata por konduki la mondan aspiron al paco ĝis plena manifestiĝo pere de *Unuiĝinta Religiaro*.

Enkonduko

Imagu mondon...

kie estas paco inter religioj,

kie homoj de diversaj religioj kaj spiritaj tradicioj kaj el ĉiuj partoj de la socio kunvenas ĉe komunaj tabloj en la tuta mondo por praktike serĉi justecon, saniĝon kaj pacon kun respekto por ĉiu vivo,

kie estas Unuiĝinta Religiaro, iu inkluzivema, necentrigita organizaĵo, spirita partnero de UNO, kie lokaj agadoj estas kunigitaj por formi mondan ĉeeston, kie la saĝo de la kred-tradicioj estas honorigata, kie la plej profundaj valoroj de la homoj estas respektataj kaj aplikataj por la bono de ĉiuj.

La Unuiĝinta Religiaro estas revo kies *jam temp' estas*.

Ekde 1995, miloj da homoj de pli ol 50 landoj kaj proksimume sammultaj kred-tradicioj, kundividis sian perspektivon kaj faris iniciatojn por krei potencon forton por monda bono enradikigita en la spiritaj valoroj kiujn ni havas komunaj. (...)

Nun UR bezonas vin por vaste kundividi tiun ĉi ĉart-projekton, por libere aldoni vian kontribuon, por krei mondan konscion pri la ebleco. (...) La projekto tute ne estas kompleta. Ĝi pasos tra granda disvolviĝo kaj pliboniĝo ĝis junio 2000 kiam homoj en la tuta mondo subskribos ĝin, naskante URon.

Via partopreno estas bezonata nun por prepari ĝian naskiĝon. Kune, ni estas URO. (...)

Rev. **Charles P. Gibbs**, Ekzekutiva Dir.,
Iniciato por *Unuiĝinta Religiaro*.

Ĉart-propono

Antaŭparolo

Ni, homoj de multaj kredoj, alvokitaj de niaj tradicioj al kompatato responde al la suferado de la homaro kaj la krizoj kiuj endanĝerigas nian mondkomunumon, deziras krei konstantan forumon kie ni kunvenu en reciproka respekto, dialogo, kaj kunlabora agado por firmigi la pacon, kaj la floradon de ĉiu vivo.

Ni respektas la unikecon de ĉiu religio kaj kred-tradicio, rigardas valoraj la voĉojn kiuj rigardas valoraj la aliajn, kaj kredas ke niaj kundividitaj valoroj povas konduki nin al ago por la bono de ĉiuj.

Ni deklaras ke nia religia vivo povas subteni nin en nia konstruado de komunumo kaj respekto unu al la aliaj, anstataŭ disigi nin.

Ni asertas ke, spite diferencojn de praktiko aŭ kredo, niaj religioj vokas nin zorgi unu pri la aliaj.

Ni kredas ke la saĝo de niaj religiaj kaj spiritaj tradicioj devas esti kundividataj por la sano kaj bonfarto de ĉiuj.

Kiel kredkomunumoj kaj interdependantaj homoj enradikigitaj en nia kredo, ni do nun unuiĝas cele al paco kaj reamikiĝo inter religioj, popoloj kaj nacioj, kaj por la profito de la tero kaj de ĉiuj vivaj estaĵoj.

Ni unuiĝas por preĝi por la paco, praktiki pacigon, esti forto de reamikiĝo, kaj oferti sekuran spacon por konflikt-solvado.

Ni unuiĝas por subteni la liberecon de religio kaj kredo kaj la rajtojn de ĉiuj individuoj, kiel ili estas formulitaj en la internacia leĝaro, kaj por kune atesti la mirindan spiriton de vivo kiu entenas nian tutan diversecon.

Ni unuiĝas en responsa kunlabora agado por uzi la saĝon kaj valorojn de niaj religiaj tradicioj por helpi kontraŭ la ekonomiaj, mediaj kaj sociaj krizoj kiuj defias nin ĉesojle de la nova jarmilo.

Ni unuiĝas por esti voĉo de kundividitaj valoroj en la internaciaj arenoj de politiko, ekonomio kaj amaskomunikado, kaj por servi kiel forumo por serĉi kaj firmigi valorojn en agado.

Ni unuiĝas por provizi per ebleco de kunlaborado ĉiujn homojn, speciale tiujn kies voĉoj estas ne ofte aŭditaj.

Ni unuiĝas por celebri la ĝojon de benoj kaj la lumon de saĝo en kaj moviĝo kaj ripozo.

Ĉiuj membroj de Unuiĝinta Religiaro solene promesas uzi niajn kunigitajn rimedojn nur por ne-perforta, komparta agado. Ni dediĉas niajn elkorajn strebojn al vekiĝo je niaj plej profundaj veroj kaj al manifestado de dia amo meze de ĉiu vivo en nia monda komunumo.

Proponita Celo de la Ĉarto : La celo de Unuiĝinta Religiaro estas krei sekuran spacon por spirita partnereco en kiu la homoj de la mondo praktike serĉu justecon, saniĝon kaj pacon kun respekto por ĉia vivo.

Unuiĝinta Religiaro



Proponitaj Pincipoj de Organizo

1. Ni kundividas profundan respekton al la sakrala fonto kaj saĝo de ĉiu religio.
2. Ni aŭskultas kaj parolas kun respekto por profundigi reciproke komprenecon kaj fidon.
3. Ni praktikas gastigadon kaj gastadon.
4. Ni traktas konfliktojn pere de [praktikoj de] paco kaj reamikiĝo, sen uzo de ia perforto.
5. Ni serĉas kaj ofertas kunlaboradon kun aliaj interkedaj organizaĵoj.
6. URO estas pontkonstrua organizaĵo, *ne* religio.
7. URO bonvenigas kiel amikojn ĉiujn kiuj akceptas ĝiajn celojn kaj principojn.
8. Pridiskutoj kaj decidoj estas farendaj kun malfermiteco kaj devos speguli diversecon; ili estas neregendaj de ununura vidpunkto aŭ intereso.
9. URO honorigas, kuraĝigas kaj fidan lokan esprimadon kongruan kun ĝia celo kaj principoj.
10. URO estas necentrigita. Ĉiuj lokaj organizaĵoj havas la rajton organiziĝi laŭ sia ajn maniero, sur kiu ajn nivelo, en kiu ajn areo, kaj pri kiu ajn temo aŭ agado kiu rilatas kaj kongruas kun la celo kaj principoj.

11. Aŭtoritato estas konfidita al, kaj decidoj estas farataj ĉe la plej lokala nivelo kiu inkluzivas ĉiujn rilatajn kaj koncernatajn partiojn.

12. Ĉiu parto de URO havas la fundamentan respondecon disvolvi financajn kaj aliajn rimedojn por plenumi siajn bezonojn, kaj la duarangon respondecon kundividi financajn kaj aliajn rimedojn por plenumi la bezonojn de aliaj partoj.

13. La financa subteno de URO devas havi larĝan bazon kaj speguli la UR-diversecon. Pridiskutoj kaj decidoj pri financa subteno, inkluzive la kontribuojn de donacantoj estos traktataj laŭ maniero kongrua kun la URaj principoj.

14. Ĉiu loka UR-organizaĵo devas fordoni nur tian memstarecon kaj rimedojn kiuj estas esencaj por la regiona kaj monda plenumado de la celo kaj principoj.

15. URO konservas la plej altajn nivelojn de integreco kaj etika sinteno, prudenta uzo de rimedoj, kaj honesta kaj preciza disdonado de informo.

16. URO devontigas sin al organiza lernado kaj adaptiĝo.

Proponita Plano de agado

I - Rajtoj kaj respondecoj. (...) URO strebas apogi kaj subteni la Universalan Deklaracion de la Homrajtoj kaj la Universalan Deklaracion de la Homrespondecoj. URO staras por la fino de perforto farita nome de religio.

II - Daŭrigebla, justa ekonomio. (...) URO intencas uzi la moralan voĉon de niaj sakralaj tradicioj por helpi kontraŭ: (...) la timiga breĉego inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj la monda komerco kiu ekzistas en areoj kiuj estas morale kondamnindaj kaj ekspluatataj: seksa komerco, armila komerco kaj narkota komerco.

III- Ekologiaj postuloj. (...) La radiko de la ekologia krizo estas spirita krizo. Ĝuste kiel la religioj kaj spiritaj tradicioj de la mondo instruas respektplenan interagadon kun sakrala tuto, tiel, spiritaj valoroj kaj moralaj postuloj devas helpi la homaron remalkovri respekton por ĉia vivo kaj por la sakraleco de la tuta Planedo Tero. Ni do alvokas al interkreda kunlaborado por antaŭenigi tiun ĉi vidpunkton de amo kaj protekto de la Tero, respekto al vivo kaj harmonio kun ĉiuj vivantaj estaĵoj.

IV - Kreskigi kulturon de reamikiĝo kaj paco. URO agados por kreskigi kulturon de malperforto, respekto, reamikiĝo kaj paco laborante por dis-

volvi socion en kiu ĉiuj povas vivi sen timo de perforto en siaj personaj vivoj, siaj familioj, siaj komunumoj kaj sia mondo. Kreskigi kulturon de neperforto signifas labori por krei socion kiu honorigas la esencan indecon de ĉiu persono, transformas suspekton en fidon, kaj stimulas reamikiĝon en religiaj komunumoj kaj en la mondo. Protekti la pacon estu fundamenta agado de URO.

URO partoprenos en internacia movado kiu kuraĝigu aŭtentajn personajn kaj kolektivajn bonvolon kaj reamikiĝon, kaj kiu aktive antaŭenigu pacon. Ĝi speciale agados por cikatrigi vundojn serĉante ilojn el ĉiu kredo por respekti la fremdulon, potencigi malperforton kaj nutri reamikiĝon.

V - Kundividi la saĝon kaj kulturojn de kredtradicioj. URO agados por disvolvi dialogon, kaj teologion de akceptado por helpi la popolojn de la mondo esplori komunan grundon, konscion de unueco en diverseco, kaj ĉiam kreskantan parencecon. Religio koncernas la rilateco de la homoj kun sia spirita Origino. Ni kredas je la universaleco kaj eterneco de la Spirito. Ni kredas ke ĉiuj religioj devenigas sian saĝon de tiu plej unua Fonto. Do, la religioj de la mondo kundividas komunan saĝon, kiu povas esti eklipsita de diferencoj en religiaj konceptoj kaj praktikadoj.

19.VII.1998

Estimataj sinjoroj,

Ni korespondas kun la aŝramo de Aŭrobindo Ghoŝ en Bharato ; de tie ni ricevas librojn kaj revuojn. Ŝajnas ke tie ne estas esperantistoj, sed mi ne scias precize. (...)

Mi volas proponi mian tradukon de eseo de Ŝri Aŭrobindo. Tiu ĉi malgranda teksto ege gravas por la kompreno de liaj ideoj. En ĝi la aŭtoro esprimas en tre konciza formo sencon de la rilatoj inter la Eternulo kaj la homaro. Mi penis ne deflankiĝi de la originalo. (...)

Feliĉon kaj daŭran prosperon al vi kaj *Asistilo*.

N. Penĉukov

La Horo de Dio

Estas ja tempoj kiam la Spirito vivas inter la homoj, kaj per dia spirado pleniĝas la akvoj de nia ekzistado ; sed estas aliaj tempoj kiam ĝi repaŝas malantaŭen, lasante la homaron al ĝia propra forto aŭ malforto. En la unua periodo eĉ modestaj penoj abunde fruktodonas kaj aliformigas la destinon ; dum en la dua, eĉ grandegaj klopodoj fiaskas. Sed vere la dua povas prepari la unuan, povas esti tia ofera fumeto kia, leviĝante al la firmamento, alvokas pluvegon da diaj bonfaroj.


Malfeliĉa estas homo aŭ nacio kiun Dio, alveninte, trovas dormanta, aŭ malpreta ĉar la lucerno ne estis brulanta, kaj la oreloj restis surdaj al dia alvoko. Sed trioble ve al kiu, estante forta kaj preta, senutile malŝparas la forton kaj vane konsumas la tempon ; lia destino : ne replenigebla perdo aŭ grandega katastrofo !

En la dia horo purigu vian animon de ĉia sintrompo, hipokriteco aŭ sintrotakso, por povi direkti rigardon al via propra spirito kaj aŭdi kion ĝi ordonas. Ajna malsincereco de naturo, iam ŝirminta vin de dia rigardo kaj lumo de idealo, nun transformiĝas en breĉon en via kiraso, kiu altiras la atakon. Eĉ se vi ekfuroros efemere, des pli malbone por vi : la frapo ektondros, ĝi vin atingos kaj renversos en la kulmino mem de via triumfo.

Sed gardante purecon, forpelu timon eĉ se la dia horo povas esti terura (fajrego, tempesto kaj ŝtormego, premo de dia kolero) : kiu, plifortikiĝinte per vereco de sia destino, tiu restos neŝanceligebla, do tiujn teruraĵojn sendube eltenos. Denove releviĝos li post la falo ; forportos lin ventego sur siaj flugiloj, revenos li reen.

Do ne konfuziĝu pro la frustruoj de la prudenteco de la materia mondo, ĉar la dia horo estas horo de neantaŭvidito.

Ŝri Aŭrobindo



Estimata, mi estas eksa delegito de UEA pri islamo, en Madrido (sed devis rezigni pro tempomanko). Oni afablis sendadi al mi *Asistilon* (...).

Nun mi laboras instruante la araban lingvon kaj komparan **semidan lingvistikon ĉe "embrio" de islama universitato** en Kordovo (en la sudo).

Hispanio estas (bedaŭrinde) konata kiel "*la lando de la Inkvizicio*". Kelkaj el ni – hispanoj – pensis en la lastaj jaroj, ke Hispanio sufiĉe ŝanĝiĝis kaj do eblas **reveni al islamo**. En la komenco, kiam ni estis malfortaj kaj senordaj, en la 80-aj jaroj, ni ne trovis grandan kontraŭstaron. Nur sporadaj malhelpoj de stultaj funkciuloj malglatigis la cetere normalan iradon de islamaj asocioj.

Nu, la 90-aj jaroj montriĝis tute alispecaj. Malhelpoj ĉiam pli oftigis, kaj dum ĉi tiu lasta jaro la hispana registaro, siavice regata de la katolika organizo *Opus Dei*, lanĉis rektan atakon kontraŭ la plej dinamisma islama asocio en la lando, nome *Yama'a Islámica de al-Andalus-Liga Morisca* (kies membro, cetere, mi ne estas).

Ĉi tiu asocio kuraĝis fondi "embrion" de universitato en 1995. En septembro 1997 la ĝenerala kunveno de tiu asocio demokrate decidis ŝanĝi sian estraron (kiel kutime kaj laŭstatute) (...) Tamen la hispana registaro rifuzis agnoski la novan estraron (ĝis nun), decido kontraŭ kiu procesas la asocio nuntempe. Sed la prezidanto trudita de la hispana registaro (...) ne nur sigelis pordojn, okupis domojn, malhelpis plenan uzadon de la moskeo en Kordovo (...), sed ankaŭ minacis kaj insultis profesorojn kaj studentojn...

Nu, mi estas unu el tiuj profesoroj, kaj mi sentas min persekutata de la hispana registaro kiu – dum ĝi ne agnoskas la demokrate elektitan estraron de tiu asocio – **malhelpas** la normalan disvolviĝon ne nur de **religia agado (kolektiva preĝo)**, sed ankaŭ de la instrua agado malfermita por ĉiuj (islamoj kaj ne-islamoj, sendistinge).

Ĉe tia **manko de religia libereco** en la lando de la Inkvizicio, kion mi povas fari ? Ĉu mi kontaktu *Internacian Asocion por Religia Libereco* (kies adreson mi ne konas) ? Nu, mi sentas min en senelirejo dum mi vidas la provojn detruai asocion de hispanaj islamanoj, kiu, malgraŭ politikaj komencoj en la 80-aj jaroj, nuntempe realigas imitindan ekzemplon de **toleremo kaj pozitiva kunvivado per universalaj spiritaj valoroj**. (...)

Mi dankas vin pro via atento.

Sincere via

Ibrahim Albert.

reveno al Islamo ?

Balagué, la 15-9-1998

Estimata Samideano kaj kolego,

Mi bone komprenas vin pri Inkvizicio ĉar ankaŭ **Okcitanio** spertis ĝin kaj eĉ **malaperis** kiel lando **pro** preteksta **krucmilito** de la francoj kontraŭ la kataroj...

Ankaŭ mi partoprenas en simila provo [de universitata privata lernejo], pri interreligia studado : la 4-jara *Institut de Science et de Théologie des Religions* (ISTR) en Toulouse, kie la katolikoj tamen estas la plej influaj. (Mi eble havos la okazon paroli pri via problemo). Kvankam kun vi temas pri islama universitato, kaj do ne ekzakte interreligia instituto, eble mi povus proponi al la rektoro ke **ISTR starigu rilatojn** kun via institucio ?

Sed mi ne scias ĉu li akceptus tian proponon, kaj eĉ ne ĉu jam ekzistas rilatoj inter ISTR kaj aliaj similaj institucioj en Francio aŭ eksterlande.

Jen la adreso de IARF (...), kvankam ĝi kutime helpas nur jam organizitajn dialogajn grupojn : ĝi "*subtenas projektojn de interreligiaj komunumoj en lokoj kie estas internaj etnaj kaj religiaj konfliktoj, kiel en Bangladeŝo, Bharato, Pakistano, Hungario, Rumanio, Nord-Irlando, Filipinoj kaj Niĝerio.*"

Eble vi ankaŭ povus **kontaktiĝi kun S. Benchekh**, filo de la eksrektoro de la pariza moskeo kaj WCRP-ano (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco). Li verkis franclingvan **libron pri "Islamismo en la laika Francio"**¹, kie li esprimas kritikojn kaj al la registaro kaj al la franca katolika estraro.

Li probable bonvolos helpi kaj konsili vin. Li estas religia sed tre modera kaj moderna : li estas, ekzemple, doktoro pri fiziko aŭ matematiko. Mi parolis kun li en 1993 dum komuna partoprenado en kolokvo organizita apud Cluny, de la junulara sekcio de WCRP : li eble memoros pri mi kiel ASISTI-sekretario kaj neoficiala reprezentanto de TEJO ĉar ĉiuj sciis ke mi estas esperantisto.

Kaj, se vi deziras, **mi bonvenigas vin** en nia asocio. (Por membriĝi "*la nura kondiĉo estas toleremo al ĉiu neagresema esprimo de opinio.*")

Bonan kuraĝon al vi kaj al viaj kolegoj, kaj daŭrigu agi por "toleremo kaj pozitiva kunvivado per universalaj spiritaj valoroj" kiel vi mem skribas : jen nobla idealo.

Samideane kaj fratece* via Ch. L.

* **Zamenhof** diris (en *Preĝo sub la verda standardo*) : "*Kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj, ni ĉiuj de Di estas filoj*" ...kaj do ĉiuj fratoj, ĉu ne ?



Kordovo (ES), 19-11-1998

Kara amiko Christian Lavarenne,

D-ro Mansur Abdussalam Escudero, Prez. de *Hispana Federacio de Islamaj Religiaj Organizaĵoj*, rakontis al mi hieraŭ ke S^{ro} De las Heras (Ĝenerala Dir. de Religiaj Aferoj ĉe la Ministerio de Justico) asertis al li (17-11-98), ke la **Ministerio finfine akceptis ne plu bari** la demokratitan funkciadon de tiu *Yama'a Islámica de al-Andalus-Liga Morisca*.

En ĉi tiu afero de *Yama'a...*, la problemo ne estis religia, sed nura konflikto de monaj interesoj (...): lertulo vidis eblecon riĉiĝi per vendado de la domoj kiujn alilandaj islamanoj donacis al la asocio. (...) La situacio solviĝos iel aŭ aliel.

Dume mi plu instruadas araban lingvon kaj komparan semidan lingvistikon, malgraŭ ke mia salajro ne sufiĉas. (...) Mi ne havas televidilon nek aĉetas ĵurnalojn, kaj mi pagas mian matenmanĝon per la mono ricevita kontraŭ privataj klasoj.

(...) Ali-teme, mi informas vin ke la **vorto mahometano** (kaj ties tradukoj ajn-lingvajn) **malplaĉas al multaj islamanoj**. Plej ofte la motivo estas ke islamano ne bazas sian identecon kaj personecon sur la persono Muhammad sed **emfazas la universalecon de Islamo sendistinge de mesaĝoj** de iu aŭ alia spirita gvidanto (ĉar el islama vidpunkto, **ĉiu popolo ricevas mesaĝon el la sama Fonto** per konvena spirita gvidanto).

Cetere, mi kuraĝigas vin daŭrigi vian eldonan laboron. Kiam mi legas *Asistilo*-n, mi ĉiam pli konvinkiĝas ke ni, kunhomoj, bezonas atente aŭskulti unuj la aliajn. Kial oni ne povus kunvenigi plurajn sinsekvajn prelegantojn, ĉu ili asertas la malon, ĉu la samon kiel la aliaj (mi aludas n^o 22 p. 25) ? *Pares cum paribus congregentur* (proksimume : "egaluloj ĉiam staru kune") : tio ĉi ŝajnas la devizo de kelkaj homoj kiuj nervoziĝas antaŭ la bunteco trudata de la realo mem.

Ĉiuj povas profiti de forumo tia kia *Asistilo* estas, en kiu ĉiu povas **prezenti sian komprenon** pri si mem kaj pri aliaj. Tiel ni povas ekkoni nin reciproke tiel profunde kiel nia komprenpovo atingos, ne nepre kontentiĝante per nur apud-estado silenta (**eĉ se foje silento helpas**). Kiam mi renkontas homon kun malsama mondobildo, ni ambaŭ estas devigatas silenti (ĉu vorte, age aŭ kore), aŭ **konsciigi pri niaj similoj kaj malsimiloj** : tiel do pliprofundigante nian mem-konon.

(...) Resume, **jen unu el miaj valoroj : bunta estas bela.**

Amike via **Ibrahim**

1/ Temas pri subtitolo ; la titolo estas pli okulfrapa : "Marianne [personigo de Francio] kaj la Profeto".

Respondo de Jeremi Gishron al Jacqueline Lépeix, punkton post punkto, laŭ ŝia plendo kaj kritiko.

S-ro Jeremi Gishron deziris "oficiale" respondi al la komentoj aperintaj en n-ro 22 p. 21, kaj petis nin publikigi la jenon, per kiu mi proponas fermi debaton, eble ne tre interesan por nepartoprenintoj? (*La Red.*)

Eble Pavla ne difinas sin kiel "kristanon". Do oni povus negative diri ke nur du trionoj estis judoj el la prelegantoj. Sed se oni tute rajtas difini mem sian "religian apartenecon", oni devas konstati ke s-roj Wandel kaj Melamed ne parolis pri religiaj temoj. Rabeno Milgrom parolis nur pri **pacagado** kiu, li diris, estas eĉ pli grava ol la religio, kaj Ĥajutman havas iom liberpensajn "kabalistajn" ideojn kiuj eĉ proksimiĝas al hindaj konceptoj. Mi mem ĉefe parolis pri *esperantaj* aferoj, inkluzive pri Zamenhof, kaj la alfabeto kaj la geografio. Nur s-ro Rotsztein do tuŝis la **Talmudon** kaj la milionojn da libroj el la juda tradicio.

Pravas ke mi komence anoncis tri organizantojn, sed je la fina konkludo mi rezignis pri tio kiel malvero – ĉar efektive nur mi laboregis kaj faris la tutan organizan laboron. Estis tamen kelkaj ĉefpartoprenantoj kaj unu el ili estis Ezra, sed ankaŭ Hans-Holger (kristano) multege helpis, kaj nature Pavla, kiu jam havas iom da sperto pri tiatipaj esperantaj seminarioj. Ŝin mi ja do multe konsultis.

Kvankam estis iom da viglaj diskutoj en la hejmo de Ezra (...), mi ne sentis ke Rotsztein iel provis "misiadi" dum sia prelego, sed nur informadi. Tutcerte li rajtas kredi "ke lia religio estas vera", kaj pri aliaj religioj li malmulte diskutis, laŭ mia propra observo. (*Fakte* tute normala sinteno dum "interreligiaj" debatoj en nia lando). Ĉu juda religio ankaŭ fakte havas "politikan" signifon, estis temo kiun mi petis al li entute eviti, sed li ne volis obei al mia konsilo (kaj mi ja ne povas cenzi lian prelegon se "regas" demokrata etoso).

Pri **komuna devotado** oni nature devas decidi pri ĝia formo. Do mia propono ne estis "kontraŭa" sed nur "kroma". Post la seminario mi iom konsultis Rabenon David Rosen pri la esenco de tiaj "interdevotadoj" (...). Miaopinie oni devas eviti ĉian "*kracion*", eĉ la "demokratian" [tiele] kaj nur permesi "ortodoksan *anarkion*", t.e. ke nur Dio regu kaj ne la homoj.

Sed pri la etoso, mi tute ne konsentas kun Jacqueline ke oni difinus la vorton *religio* kiel nure "pura juda afero". La vorto *pilgrim[ant]o* signifas "fremdulo", kaj se la partoprenantoj sentus sin tute hejmece, kiom fakte valorus la vojaĝo? Tamen mi feliĉas ke ŝi skribas "*pura ... religio*", kaj ne malpura. Vere, kun mia sperto, mi povas informi ke ŝi konas "nenion" pri la Torao kaj pri la Talmudo (= juda religio), se ŝi pensis ke nia seminario estis "pure juda".

Malveron mi trovis **nur unu** en ŝia kritiko (krom la personaj atakoj kontraŭ Ezra, kiujn mi ege bedaŭras), nome la aserton ke "Jeremi Gishron" *konstante* parolis en la silentejo. Sed, kelkfoje, parolado estas malaŭdebla, kaj tial ne valoras provi la aŭskultadon ĝis regas ĉirkaŭe tuta silento. Mi scias kaj perfekte memoras miajn vortojn dum tiu kvaronhoro.

a/ Sidiĝante, la dumetruo kaj ortodoksa judo Amiram subite iom surprizite eksaltis. Montriĝis ke li hazarde sidiĝis ĝuste sur kelkcentimetran nigran skarabegon. Do mi ekkriis, mirigite: "*Sankta besto*" (ĉar ĝi estas sanktega: ekzemple en la egipta mitologio, kie skarabego ĉiutage rulas la sunon tra la ĉielo), kaj dume li rapidege liberigis sin de tiu abomena insektaĉo kaj "elsilentejigis" ĝin.

b/ Dum la *profundega* silento kiu poste regis, alvenis afabla vilaĝa hundo, kaj ĝi ekkuis apud la centra florbukedo. Do mi fine rimarkigis ke tio *memorigas* pri la kvar dimencioj en la Mistika Kabalo. La ŝtonoj estas la silentaj, la floroj estas la kreskantaj, la hundo estas la vivanta kaj la homoj estas la parolantaj (ĉu eble mi ankaŭ menciis ke eĉ ekzistas malofta kvina dimencio: "israelo", la luktantaj, mi ne plu memoras). Ĉu 6 ĝis maksimume 10 vortoj [?] dum 15 minutoj, do malpli ol po unu vorto minute, vere signifus *konstantan* paroladon? □ **Jeremi Gishron**

Pro la ĉi-supra respondego, el kiuj mi forigis nur du frazojn rilatajn al alia persono, ne plu restas loko por la fino de lia raporto nek alia letero lia, legeblaj en Jebulo n^o 20, novjaro 1999 (P.k. 23180, IL-91231 Jerusalem).

Interreligie ĉe Berlina UK

Je la 8-4-1999 en Nice (F)



Tre estimataj gesamideanoj,
saluton kaj pacon al vi!



Certe multaj el vi partoprenos la 84-an Universalan Kongreson de Esperanto, kies temo estos: "*Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?*", kaj kiu okazos de la 31-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto en Berlino.

Je la nomo de BEL (Bahaa Esperanto-Ligo) mi oficiale **invitas vin** al komuna agado. Dum tiu UK, estos publika kunveno en kiu religiaj asocioj esperantistaj prezentos sian vidpunkton kaj respondos la demandojn de aŭskultantoj **pri jena temo**: "*Tutmondiĝo: ĉu rolos la religioj por paco?*"

Mi opinias ke komuna kunveno estos simbole pli grava kaj havos pli fortan efikon ol unuopaj alvokoj disaj. Oni povus ankaŭ ligi ĝin kun la interreligia diservo tradicie organizata dum ĉiu UK, kaj tia duobla evento eĉ povus vekti plian intereson de neesperantistaj amaskomunikiloj por nia kara lingvo Esperanto.

(...) Mi tre ŝatus koni viajn reagojn pri tiu projekto kaj bonvole akceptus ĉiujn viajn proponojn por realigi ĝin. Elkore kaj s-ane, d-ro **Eric Coffinet**

Adreso: 307, Promenade des Anglais, F-06200 Nice.
(Faks.: 33 (0)493 716 972; Eric.Coffinet@wanadoo.fr)

300-jariĝo de la Sikh-a Khalso



Kiam Govinda Rai, kiu fariĝos la deka kaj lasta guruo de la Sikhoj, estis nur 9-jara, "lia patro Teg Bahadur (la 9-a guruo) rifuzis la ordonon de la moghola imperiestro Aŭrangzeb konvertiĝi al islamo kaj estis senkapigata"¹, la 11-an de novembro 1675. La islama imperiestro ordonis ke "oni distranĉu lian korpon en kvar partojn kaj pendigu ilin ĉe la kvar pordoj de la Ruĝa Fortreso en Delhio"².

La 30-an de majo 1699 en Anandpur, Guru Gobind Singh, 33-jara, glavenmane, demandis kiu el liaj *sikh* ("disĉiploj") estas preta fordoni sian vivon? Unu jesis kaj sekvis lin internen. Tuj poste la guruo eliris, sola; **sango gutis de lia glavo**. Li refaris la saman demandon. Sammaniere kvar pliaj disĉiploj malaperis unu post la alia. Oni poste nomis ilin la *Panĝ Pjare*, la "Kvin Amatoj".

Ili ne estis buĉitaj, sed incitaj, kaj fariĝis la unuaj membroj de la Khalso (*Khâlsâ*), milita ordeno kies nomo signifas "Pureco". Ĉiuj gevoj estas akceptataj en ĝi, dum inica bapto per sukera akvo miksitita en fera kuvo per ambaŭtranĉa glavo. La virinoj same kiel la viroj ricevis glavon (*kirpân*) kaj ŝtalan brakringon (*kara*); tiu ĉi estas simbolo kaj de ŝildo kaj de simpleco³. La viroj devis anstataŭigi la *dhoti* (ia hinda pareo) per mallonga pantalono (*kaĉha*), pli taŭga por militistoj; kaj lasi netonditaj siajn harojn (*keŝa*), simbolon de forto⁴.

La lasta *k[0]*-aĵo kiun ili devas ĉiam kunporti estas kombilo (*kanghâ*), laŭlegende ĉar ili iam estus venkitaj en batalo pro la ĝeno de siaj longegaj haroj, sed precipe por distingi sin de hinduaj asketoj kiuj lasas siajn harojn nature plektiĝaĉi⁵.

Kaj ĉiu el ili ricevis la kromnomon *Singh*: "leono" (nun plej komuna "familia" nomo ĉe la sikhoj), kaj male de plej multaj hinduoj ili rajtas manĝi viandon ĉar ili rajtas mortigi eĉ homojn!

(Nur Gandhi sukcesis "rekonverti" ilin al sia malperforto (ahimso). Kaj Indira Gandhi estis mortigata de unu el ili, post kiam ŝi sieĝigis kaj sturmigis ilian Oran Templon en Amritsar.)

Du jc. antaŭ Zamenhof: homaranisma devizo

"Ili ricevis la ordonon asisti la mizerulojn, batali kontraŭ subpremado, fidi la Unikan Dion kaj rigardi ĉiujn homojn kiel egalulojn, senkonsidere de ilia kasto aŭ religio".⁶

Kaj fakte, verso de himno el *Sri Dasam Granth* ("Libro de la Deko [Guruo]") povus esti rigardata kiel devizo de la Zamenhofa homaranismo:

manas ki ĝât sabhaj ekaj pahĉhânbo
oni rekonu ke la tuta homaro estas unu⁷.

Jubilea konferenco

La sikha aŝramo *Gobind Sadan* kaj *Temple of Understanding* organizis universitatan konferencon en Delhio, la 18-an de februaro.

D-ro Karan Singh, prezidanto de la Templo de Kompreno, en sia inaŭgura prelego, laŭdis la guruon pri lia sukceso firme starigi "la principon ke la Vero estas unu, ke neniu religio havas la monopolon pri Vero, kaj ke **ni estas unu homa familio kun la sama Lumo en ĉiu animo**"⁸.

I.a. d-ro Harbajhan Singh Soch, vicprez. de la *Guru Nanak Dev* Universitato en Amritsar, diris kiom miriga estas la peto de Guru Gobind Singh al sia propra patro ke tiu sinoferu por la protekto de religia libereco. Li substrekis la gravecon de lia ekkonscio ke "la ununura maniero laŭ kiu ni povas esti identigataj estas ke ni estas homoj".

Lia Sankta Moŝto Baba Virsa Singh, estro de *Gobind Sadan*, jene alparolis la partoprenantojn:

"Guru Gobind Singh instruis nin provi fariĝi bonaj homoj, speciale per la praktikado de meditado. Tio ĉi estis la misio de ĉiuj profetoj.

(...) Li neniam kreis ian sektan religion. Pli ĝuste, li levis humilajn kaj malfortajn homojn kaj ŝanĝis ilin en Khalsan, signifantan tiujn kiuj bruligas sian malbonan karmon kaj leviĝas super koleron, kritikemon kaj deziron de alies posedaĵo.

Mi sentas ke oni ne bezonas fariĝi kristano por kredi je Jesuo, aŭ islamano por kredi je Profeto Muhamad, aŭ sikho por kredi je Guruo Gobind Singh. Tiuj ĉi apartigitaj domoj de religioj estis kreataj de pastroj, ne de Dio. Estas ununura maniero sekvi Guruon Gobind Singh: vidi lin ĉie, post kiam vi ekvidis lin en via koro. Guru Gobind Singh kaj la povo de Dio, la ekzisto de Dio, estas la samaj. Kiu sekvas lin neniam povas krei malgrandan fortikaĵon el religio." □

1/ Marie-Simone Renou [Ecole Française d'Extrême-Orient], "Sikhs", en *Enc. Univ.*, vol. 14 (1975), p. 1017c.

2/ Ganda Singh M.A., Ph.D., *A brief account of the Sikhs*, Amritsar: Shiromani Gurdwara, 1981⁵, p. 11.

3/ En Bharato ĉiuj braceletoj estas el oro, oritaj aŭ almenaŭ or-similaj.

4/ Kiel ĉe hebreaĵoj *nâzir*-oj, ekz-e Ŝimŝon (Samsono).

5/ Kiel simbolo de ilia spirita forfuĝo el la mondo.

6/ Prof. Harbans Singh, *Le sikhisme*, Louvain: Centre d'histoire des religions, 1985, p. 22; el la kvin unuaj, tri estis servistoj (*ŝudra*), unu militisto (*kŝatrija*) kaj la lasta, Ĝat (ano de *Raĝput*-a tribo).

7/ Laŭvorte: la homa raso estu rekonita unu socio.

8/ "Guru Gobind Singh Conference", en *Gobind Sadan Times*, feb. 1999, p. 3-4. Mia ununura fonto pri ĝi.

Leteroj

Strasburgo, 29-3-1996

Ci menciis en cia biografieto [en n-ro 18 p. 32] ke ci iam estis dominikana predikisto. Kutime dominikanoj estas monaĥoj kaj pastroj : (...) ĉu ci faris promesojn de monaĥo (pri malriĉeco ŝajnas ke, se ci ion promesis, ĉi tion ci respektis) ? Ĉu ci estas pastro ? (...) Laŭ kvakeroj **ĉiuj homoj estas pastroj** ; do unue, mi estas pastro, due, mi malaprobis ke ekzistas speciala kasto por tiu servo, tial mi emas al kontraŭklerikalismo.

Kiam mi ekstudis en Clermont pri la studentoj zorgis juna dominikano, Pierre. Iam mi eksciis ke dum la somerferioj Pierre edzinigis la studentinon kiun li antaŭe gravedigis ; kaj ke pro tio la episkopo de Clermont lin ekskomunikis. **Ŝokis min ke la episkopo povis ekskomuniki** mian amikon **sen demandi pri mia opinio**. Ekskomuniki signifas forpeli el la kolektivo ; la kristana kolektivo kies membro Pierre estis, estis la kolektivo de la katolikaj studentoj de Clermont : la episkopo [laŭ ŝi] ne rajtis lin forpeli el nia kolektivo sen nia konsento. De tiam mi ne plu rigardas min katoliko, (...) mi estas anarkiema kaj mi rigardas katolikismon kiel ŝtatan religion de la romia imperio, de Konstanteno ĝis Francisko-Jozefo. Do tio ne povas taŭgi por mi.

Ekde kiam mi fariĝis kvakero, nur plurajn jarojn poste, mi ne plu spontanee iris al aliaj diservoj : nur se mi estis eksplicite invitita. (...) Kiam mi estis delegito de la kvakeroj ĉe *Eklezio kaj Paco*, la ĝenerala asembleo de la franclingvanoj okazis ĉe katolika kolektivo, do **ni ĉiuj estis invititaj** al la meso, inkluzive de la komunio. Nu, **se oni min invitas, mi iras**. Sed tre ĝenas min ke la pastro asertas ke lia kartoneca rondaĵo estas la korpo de Kristo kaj ke mi devas diri *amen*. Mi kredas ke **se kristanoj kunvenas Kristo ĉeestas, do** mi kredas la ĉeeston de Kristo **ankaŭ en la katolika eŭkaristio**, sed kial ĝuste en tiu kartoneca rondaĵo ?

Mi scias ke la **katolika eklezio iam deklaris hereza mian sintenon** "*ĉar Kristo ĉie ĉeestas, do ankaŭ en la hostio, same kiel en ĉiuj aliaj lokoj*". **Do kiel mi faru ? Fakte mi absolute ne bezonas ion engluti** por esti en komunio kun la aliaj. Sed se mi ne englutis la kartonecaĵon kiun englutis la aliaj mi **timas ke ili ne komprenos** mian sintenon. Kaj por ĝin engluti mi nepre devas diri "amen".

Fakte mi kredas ke **mi estas profunde ikonoklasta** : mi tute ne bezonas ke la ĉeesto de tio kion mi nomas Dio, estu simbolata per hostio, per kandelo, aŭ per kio ajn. La diferenco kun la historiaj ikonoklastoj estas ke mi vivas post la voĉdonado

de la universala **deklaracio pri la homaj rajtoj** : konsekvence mi ne senigas la aliajn je iliaj rajtoj havi siajn ikonojn. Sed mi ŝatus ke la katolikoj, kiam ili min fratece invitas, ne trudu al mi deklaron pri sia hostio, kiu iom ŝokas mian profundan ikonoklastecon. Aŭ **ĉu mi povas min deteni** sen ke ili interpretos tion kiel rifuzon de ilia invito ?

Kompreneble **Dio ĉeestis inter ni** en Szombathely* kiam ni festis la naskiĝtagon de la guro de nia hindua amikino. Mi ankaŭ ne nepre bezonis la sukeraĵon kiun ŝi tiam disdonis. (...) Sed laŭ ci, el la ASISTI-anoj, kiel estus reagintaj la katolikoj se nia hindua amikino estus postulinta de ili deklaron laŭ kiu la sukeraĵo estas avataro de Viŝnu, aŭ kian ajn **teologiaĵon absolute nekompreneblan** por katolika menso ?

Mia problemoj kun katolikoj estas ke mi preskaŭ neniam komprenas la demandojn al kiuj respondas iliaj dogmoj ; ekzemple ĉu Kristo ĉeestas en la hostio aŭ ne. **Tio por mi simple nenion signifas**, do respondi "jes" aŭ "ne" ne eblas, ĉar mi **ne scias pri kio oni parolas**.

La problemoj estas ke preskaŭ ĉiuj francoj, inkluzive de la ateistoj, havas mensojn de katolikoj. Iam en La Chaux-de-Fonds, Gacond prelegis pri la religiaj ideoj de Edmond Privat. Ĉar E. Privat estis kvakero la prelego ne alportis al mi multon novan. Sed ĉiuj francoj kiuj ĝin aŭdis, diris al mi ke la prelego estis terure komplika, kaj ke ili ne povas kompreni la religiajn ideojn de Privat. De tiu tempo mi scias ke mi ne estas normala franco.

Nu, mi devas diri ke ci ege relevas la nivelon de mia estimo al katolikismo, same kiel Morteza ege relevas la nivelon de mia estimo al islamo. (...)

Ci rajtas publikigi kion ci volas el miaj leteroj sed evitu publikigi ion kio povas iun ŝoki. Mi taksas ke ci mem povas multon kompreni, sed ciaj legantoj ne nepre. Fratece. **Jacqueline**

Resp. : *Mi ne estis pastro : nur studento kun portempaj votoj. De psikologia vidpunkto, se oni ne sentas Dion en si, povas esti bone kredi ke Li/Ĝi enestas ion kion ni manĝos : tiel Li "ekestos" en ni. Se tio ĝenas vin, veraj katolikoj pli ŝatos vian respektan sindetenon ol ŝajna partopreno en ilia fido.*

Strasburgo, la 18an de novembro 1998

Fine de aŭgusto okazis la jar-sembleo de la **francaj kvakeroj**. Kiel kutime oni petis de mi ke mi faru **laborgrupon pri Esperanto** (...) □

* 2-a Interreligia Seminario, apr. 1995, vd. 17 p. 13.

Infanaj pensoj pri Dio, anĝeloj kaj ĉielparadizo

Ni tradukis el la hungara versio de usona libro (!) tiujn diraĵojn kiuj plej plaĉis al ni. Espereble konserviĝis iom da ilia ĉarmo.

Kio estas Paradizo?

– Paradizo estas stacio post la morto... se neniu ŝercemulo sendas vin al la alia direkto.

(Harmon, 11-jara)

– Ia ripozejo, kie la mortintoj ricevas novajn pulmojn, kaj poste kantas kristnaskajn kantojn dum la tuta jaro.

(Roger, 10-jara)

– Trankvila, paca loko, kie ne estas insektoj... la insektoj havas propran paradizon, kie Dio preparis por ili enorman piknikon.

(Jacques, 7-jara)

Kiel estiĝis la Paradizo?

– Eksplodis vulkano kiu, anstataŭ lafon, enhavis amon.

(Trent, 11-jara)

– Oni kreis ĝin tuj post la spageton. Ankaŭ spageto gravas, ĉar ĝi enhavas sanigajn vitaminojn. Verŝajne ŝatas ĝin eĉ la animoj.

(Norinne, 7-jara)

Kie estas la Paradizo?

– En la herbo... ĉie kie Dio ion kreis.

(Hallie, 8-jara)

– En la Biblio. Tie oni plurloke rakontas ke ne eblas mallongigi la vojon al Paradizo... Pravas, ke Moseo mallongigis la vojon tra la Ruĝa Maro, sed tio estis krizokazo.

(Stephen, 9-jara)

– Rigardu la nubojn tie supre... provu imagi kiu faras tiom da pluvo kaj neĝo... certe ne la prognostisto!

(Mort, 10-jara)

La plej grava regulo en Paradizo?

– Turniĝu por montri ankaŭ la alian vangon... sed poste ne surpriziĝu se oni ĝin multe kisas, ĉar konstante okazadas tio en Paradizo.

(Bryn, 11-jara)

– La lasta alveninto devas elporti la rubaĵojn. Sed ne tro malĝoju, ĉar en Paradizo eĉ la rubaĵoj bone odoras.

(Rodrick, 8-jara)

Kiel Dio komunikas kun la Paradizanoj?

– Ne estas fajranta arbusto, aŭ io tia... En Paradizo, ĉ. 1980 oni ĉiujn komputizis.

(Grethen, 10-jara)

– Ni nepre ne forgesu ke ankaŭ Dio foje ploras.

(Simone, 11-jara)

Ĉu necesas trapasi specialan teston por eniri Paradizon?

– Vi devas rekoni la diablon en vico de fiuloj.

(Nathaniel, 9-jara)

– Dio rigardas vian tutan vivon en videobendo. Se vi poste povas rigardi lin en la okulojn, Dio helpas al vi lerni el viaj eraroj.

(Joyce, 11-jara)

– Ne estas testo. Vi nur anonciĝas ĉe ia Paradizotendar-ĉefo, kaj li montras kie enloĝiĝi.

(Elliot, 8-jara)

Kiel aspektas anĝeloj?

– Ial ili ĉiam surhavas noktoĉemizojn... eble ili estas kiel la fajrobrigadistoj, kaj meze de la nokto devas eksalti kaj gliti suben laŭ stango, se estas ie krizo.

(Andrew, 10-jara)

Kio necesas por esti anĝelo en nia moderna epoko?

– Pli bone ili devas memori nomojn. Nuntempe estas pli da homoj sur la tero, kaj se anĝelo intermiksas ilin, eble enamiĝas iu kiu volis nur ke lia aŭto startu en la malvarmo.

(Andrew, 10-jara)

Lasta penso, pri la Kredo: Se ni vere forte kredas, ni lumas, kiel lampoj; kaj tiam Dio vidas nin, kaj pli bone povas nin prizorgi.

(Rich, 8-jara)

Erika Tóth kaj Majk Sadler

Pli ol toleremo

En memserva restoracio maljuna virino aĉetas bovlon da supo. Ŝi sidiĝas ĉe tableto sub kiu ŝi pendigas sian mansaketon. Post momento ŝi reiras al la bufedo ĉar ŝi forgesis preni kuleron.

Kiam ŝi revenas al sia tablo, la sinjorino trovas tie junan afrikanon, haŭtnigran, harfrizitan, kaj bunte vestitan, kiu manĝas ŝian supon. Ŝi unue gapetas kaj mallonge pripensas; kaj post afabla rideto, ŝi antaŭenigas sian kuleron kaj ekĉerpas supon el la sama bovlo. Kaj ili kune manĝas.


Fine de la manĝado la junulo iras aĉeti du taŝojn da kafo kaj prezentas unu al ŝi. Kiam ili fintrinkis sian kafon li afable salutas ŝin kaj foriras. La tuto okazis preskaŭ senvorte ĉar ili ne parolis la saman lingvon.

Ankaŭ la sinjorino stariĝas por foriri; ŝi kliniĝas por repreni sian mansaketon el sub la tableto. Nenio plu! Malaperinta! "Li vere estis fiaĉulo! Mi devintus estis singardema ekde la komenco. Fi! Kia honto!" flustras al si mem la sinjorino, kies vangoj ruĝetiĝas pro kolero. Ŝi turniĝas kaj rigardas ĉiudirekten, sed jam tro malfrue: li malaperis.

Sed subite, sur apuda tablo ŝi ekvidas bovlon kun malvarmiĝinta supo, kaj sub la tableto, sian mansaketon kiu pendas.

(Anonima rakonto)

(El *Confluence* n-ro 2 p. 6, Kebeka centro de Raĝajogo.)



Granda Unueca Kredo

ĉ. 1 : Apero (fino)

16. Je nomo de GUKo. Miraklo ekzistas en apero. Ne opiniu ke apero nur okazus en fizika spaco: tia analizo ne koincidas kun fundamento en GUKo. Ili penegre per mirakloj pruvas la ekziston de GUKo, kaj ne per sablo kaj floro! Saĝon al ili.

17. GUKo faris nin ne por morto sed por amo unu al alia. Per tio li aperus en fora horizonto de apero.

18. Kiun per okuloj [ni] ne povus vidi,
kiun per oreloj [ni] ne povus aŭdi,
kiun per manoj [ni] ne povus tuŝi,
supr[a] tri[o] estas ne atingebla!
sed mikse unueca!

trans ĝi la lumo ne estis reliefa,
kadre de ĝi ne estas malhela,
kiu, senlima kaj nenomebla,
ja apartenas al vakuo!

Kiu estas formo de sen-apero,
ni nomas tiun subkonscia.

Ne troviĝas ties komenco kaj fino;
nur per malnova modelo [ni] rigardas novan aperon;
dum studado de la kosmo, ni trovus veron!

(el Lao Zi, ĉapitro 14)

19. En GUKo diverseco estas verda,
kiu montras vivon kaj ŝancon;
monotoneco montros morton kaj senesperon.
Tiuj validas ĉu en naturo ĉu en vivo!

20. Je nomo de GUKo, organizo ne estas kunigaĵo,
ĝi posedas sian animon kaj superas ĉiujn siajn anojn.

La homa socio ja estas mia plej pompa kreaĵo
kaj la suno estas ĝia manĝaĵo,
GUKo estas ĝia nervo! Amen.

21. Dormante, li fariĝus papilio,
vekiĝinte, li ne povas distingi
ĉu li estus homo transformita el papilio?
aŭ estus papilio transformanta homon?
Jen respondo: li ĉiam apartenas al apero.

22. Kiam oni pristudas
la rilaton inter memo kaj eksteraĵo,
subjekto kaj objekto, spirito kaj materio,
ili do perdus la klaran bildon pri la mondo.
En GUKo, mi nomas ĝin: apero.

23. Vi povas krei aperon,
kaj neniel vi povas duonhaki ĝin.
Kiam vi trahakis ovon, vi perdis ĝin!

24. Ĉe unueco de spirito kaj materio je apero:
la kopalo [?] fariĝus vizaĝo,
la vizaĝo fariĝus kopalo;
la junulino fariĝus maljunulino,
la maljunulino fariĝus junulino;
la anĝelo fariĝus demono,
la demono fariĝus anĝelo.....

25. GUKo nur signifas komencon, kaj ne finon!
En la transteoria apero mi vidas
pompecon de homaj intelektoj en futuro.

GUKo estas informeca,
GUKo estas evoluema,
GUKo estas granda!

26. Via emocio, via ideo, via kutimo...
ĉiuj apartenas al via memo.

GUKo tiel kreis ununuran nin! Amen.

27. Je nomo de GUKo,
ne troviĝas tia lingvo
kia transas komprenon!

28. Kara amiko, vi demandas:

- Ekster ĉiuj aperoj de la kosmo, kio troviĝos?
- Jen la respondo: nova apero!



Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista
萬國世界語道學協會

道

Kedzierzyn-Kozle, 25-7-98

D-ro Koppel kaj Prof. Liang Zi-ming deziras fondi **stud-centron pri ĉinaj sanigaj teknikoj**, inkluzive de instruado pri **ĉinaj religio** kaj filozofio. Prof. Liang promesis al mi artikolon por *Asistilo* pri la **majstrino Ĉing-haj**, de kies movado li estas altranga adepto en Pollando. Ŝi estas interesa fenomeno, kvankam mi mem konsideras la purecon de ŝiaj motivoj suspektinda (eble maljuste).

En la plej granda pola landa kunveno, pasinta aŭtune mi prelegis pri meditado kaj disdonis informojn pri ASISTI al ĉiuj partoprenantoj. (...)

Mi **pardonpetas** al ĉiuj al kiuj mi ŝuldas leterojn kaj la *Tao*-n. Mi intencas kaj dissendi novan numeron de *Tao*, kaj respondi al ĉiuj leteroj (...) kaj do petas superhoman paciencon (...)

Mi intencas finfine en 1999 registri la Sud-Amerikajn [UTSLE-ajn] membrojn kaj sendi la peton por fak-asocia statuso al UEA.

Ĉu estas intereso pri post-kongreso Taoisma kun **interreligia seminario** en Pollando? Distanco inter Berlino kaj Kedzierzyn estas tre malgranda.

10-2-1999 Mi ĉiam pli esperas kaj supozas, ke mi povos okazigi Interreligian/UTSLE-an **seminaron** en Pollando. Mi krome ricevis peton de la Kvakeroj rilate al grupa partoprenado kaj kunlaborado, kaj mi havos diskuton en frua marto kun aliurba eŭrop-ĉina centro *Sano*, kiu eble deziras kunlabori.

Kedzierzyn estas ĉe facila vizit-distanco de Glivico kie estos samtempe la **ekumena kongreso** (malpli ol unu horon per tre malmultekosta malrapid-trajno). Ni eĉ havas famegan monton, kiu estas sankta al nov-paganoj kaj katolikoj. **B. M.**

Proponita temo: Spiritualeco kaj Naturo.

Jaro 2000

Preskaŭ ĉie en la mondo sentblas interna alvoko por kompleta **regenerado** ebliganta rigardi laŭ vere nova maniero estonton en kiu regos respekto al la Naturo, kunlaborado inter la popoloj, akceptado kaj kundivido de la kulturaj diversecoj, korektado de la malekvilibroj kiuj endanĝerigas la Homaron. Tio ĉi tamen eblas nur se la deziro de pli bona mondo vekigigas en ĉiuj niaj koroj, kaj manifestiĝas ĉiun tagon de niaj vivoj.

Urĝas do ke ni reamikiĝu kun ni mem, kun niaj kunhomoj, kun la mondo, kun la Vivo : kva-zaŭ la tuta Universo dependus de ĉiu el niaj agoj.

La Jaro 2000 tuj alvenos ! Tiu ĉi fakto entenas grandegan emocian gravecon, sinoniman de eksterordinara ŝanĝiĝo, kiu koncernas ĉiujn ; estus bedaŭrinde, limigi tion je senbridaj kaj efemeraj gajiĝoj, en bruaj festadoj. Jen do alvoko kontribui doni fortan impulson al la konkero de solidara kaj universalema konscio per la unuiĝo de la Homaro ĉirkaŭ komuna intenco ebliganta edife engaĝiĝi.

Tiu ĉi intenco esprimiĝos per tutmonda agado, centrita sur la ideo de **Pardono** kaj **Reamikiĝo**, kiuj liberigu nin de la rankoro pro la pasinto, kaj samtempe **ebligu la ĝermadon** de semoj **de paca kaj ĝoja estonto**. Vere, ne povas esti Paco sen ke la Pardono finkonsumis la malkonkordon en la koroj, en ĉiuj koroj !

Por tio, dum la **tri lastaj tagoj de decembro 1999**, ĉiuj kiuj sentus sin koncernataj per tiu ĉi ideo, simbole metus, en loko speciale preparita por tio, en kiu ajn vilaĝeto aŭ urbo de la Planedo (ekzemple sur placo), **floron, branĉeton de olivarbo, de rosmareno, de lavendo**, aŭ malgrandan planton, en taŭgan ujon. La loko devus aspekti sufiĉe digna, kiel implicate postulas ĉi tiu ago.

Tiuj ĉi floroj, branĉetoj kaj plantoj estus poste kolektataj la **1-an de januaro**, la *Mondan Tagon de Paco*, kaj **ĵetataj en la riverojn** la plej proksimajn **aŭ rekte en la maron** : tiu ĉi peranto de la unuiĝo inter ĉiuj popoloj.

Kiel kulmina (aŭ alternativa) ago, ni ankaŭ proponas ke la **momentoj antaŭ la nokto-mezo de la 31-a de decembro** (dum kelkaj minutoj aŭ kelkaj sekundoj) **estu travivataj en silento** kaj, se eblas, kune. Ni celas tiun Silenton kiu plej profunde tuŝas nin, kiu vekas la Sinceran Ĝojon kaj la aŭtentikan decidon de interna ŝanĝiĝo kaj konstrua kunlaborado.

José Ferreira Anacleto

Centro Lusitano de **Unificação Cultural**, Tv. das Aguas Livres, n° 6 - 1° Dto., PT-1250-003 Lisboa, faks. : 01-387 58 08 aŭ -812 85 96, e-adr. : cluc@mail.telepac.pt

Leteroj

20-07-98

Mi devas klarigi ke **E-Asocio de Humanistoj** havas **nenion komunan kun religioj** kvankam ni respektas vian celon pri toleremo por ĉiuj religioj.

Humanistoj ne kredas je "Superpotenco" aŭ alia vivo post morto. Sed jes, ni kredas je ia senmorteco. (Vd en n-ro 7 de *La Humanisto*.) **W. Simcock** (GB)

Gaŭahati, 08/10/98

Ŝankardeva Fondajo planas eldoni librojn pri diversaj aspektoj de Mahapuruŝa Ŝankardev en la loka lingvo kaj kelkaj aliaj. (...) Ne nur mi sed la popolo de Asamo estos ĝoja se vi povos helpi nin tradukante la libron en la francan. (...) Estonte ni strebos por traduki ĝin en esperanton. (...)

Mi opinias ke mi devus **lerni esperanton**. (...) Poste mi povus starigi E-klubon en Gaŭahati.

Elkorajn dankojn al vi pro via traduko en esperanto de parto el mia artikolo pri Ŝankardev [vd n-ro 22 p. 14-15]. (...) **P. Ch. Das** (Bharato)

Debrecen, 98.11.27

Mi opinias, ke **ĉiuj homoj bonvolaj devas aprobi la noblan iniciaton de Unuiĝinta Religiaro alvoki por tutmonda batalhalto**. Sed ja la 31-an de decembro 1999 finiĝos nur la 1999-a jaro. Do, la 2000-a jaro devas ankoraŭ aldoniĝi por ke senmanka estu la "du miloj da jaroj".

Do, pli celkonforme estus anstataŭigi "la lastan tagon de tiu ĉi jarmilo" kaj proklami : "Kio okazus, se tuj antaŭ la lasta jaro de tiu ĉi jarmilo, la 31-12-1999, **la religioj de la mondo alvokus** al tutmonda batalhalto ?" Ili farus noble, laŭ homama intenco, kaj tiel ankaŭ ĝuste laŭ matematiko. Gratulon pro via grandioza laboro ! **Tibor Papp** (H)

(Ĉefe spirita) **Okcitana antologio** (dulingva) red. Ch. Lavarenne, HIK, 1998, 46 p., 2^a reviz. eld. **30 F** (anstataŭ 40 F ĉe UEA), + sendokostoj (6,80 F).

LA JAPANA BUDHANO

Bulteno de Japana Budhana Ligo Esperantista

N-ro 302 / 2541(1998) vintro

ENĜLAVO

やさしい仏教の必要性 / Facila Budhismo Necesas (佐村隆英)	2
La Sutro "Graco de Gepatroj"(2) / 父母恩重經 (trad. Talpo).....	3
1998年総会報告 / Raporto de la ĝenerala kunsido 1998 (西泰宏)	5
「日エス辞典」の仏教用語 (8) (西泰宏)	6
インターネットの中の仏教 (3) (山口真一)	9
Konciza Informo pri Ŭonbulismo (Choe Taesok).....	9
書評 : 「般若心経を読む」 (西泰宏)	11
自著を語る : 「アショカとの旅」 (此経啓助)	13
消息・短信・情報 / Placo de Membroj.....	14
AOKI Kon'yo (AIBA Mituyasu).....	14
筆者紹介・ASISTILO・編集後記.....	15
会費納入お礼・会費改定について.....	16

Ni ricevis

Memorlibro : Kolekto de la prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okaze de la 30-jariĝo de la universitata fakto Esperantologio (Budapeŝto, 17/18-04-1997), Budapest : Universitato ELTE, 1998, 493 [+ 9] p. : "Mesaĝoj de la poemoj de Zamenhof", de O. Princz, p. 90-94 ; "La kosmologio de Martinus", T. Szabadi, 104-110 ; "Esperanto kaj framasonismo", d-rino Z. A. Berényi, 370-376 ; "Origino de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)", d-ro Ch. Lavarenne, 392-430. (ISBN : 963 7647 66 X).

La Sankta Instruo de Ŭonbulismo (Ŭonbulgjoĝon, 1962), trad. de CHOE Taesok, Iksan : Ŭonbulismo, 1998, 417 p. (ISBN : 89-86065-01-0).

Ĝongĝon [1962] / La Fundamenta Instruo de Ŭonbulismo, trad. de Choe T., korea-esp., Iksan : Ŭonbulismo, 1998, 164 p. (ISBN : 89-86065-02-9).

En la regno de la viva naturo, de Petro Dânov, Serres : "Vivo por la Tuto", 1998 [1-a : 1936], 89 p.

Epitomo de la Alianco Universala, Kalamata (Grekio) : La Alianco Universala, 1998, 34 p. [Vidu leteron de la franca fondinto en n-ro 21 p. 29].

Ya-zu English Esperanto Mongolian dictionary, de Ts. Bold, Ulanbator : Ya-zu extraseancer's temple, 1998², 96 p. (pri la 1-a eld. vidu n-ro 20 p. 19)

Ĉu jam revenis Kristo ?, [de Eric Coffinet], [Nico :] Bahaa Esperanto-Ligo, [s.d. : 1998], 6 p.

Dialogo pri religio, de Boris A. Zozulja, [Rostov-Don] : eldonejo Verda Kukolo, 1997, 24 p.

Homo, homaro, kreanta naturo : la tri fundamentoj, de Jesuo Raposo, Valencia, 1997, 14 p.

Sub la signo de la Kolombo : paco regu, de Omraam Mikhaël Aïvanhov, trad. de *L'égrégore de la colombe ou le règne de la paix*, Fréjus : Prosveta, 1995, 141 p. (ISBN : 2-85566-612-0).

Religia literaturo en Esperanto, de K.O. Sandgren & L. Nordenstorm (red.), R.F. Albert Reyna, E. Baley, G. Berveling, A. Burkhardt, J. Gishron, M. Howard, M.C. Jackson, Ch. Lavarenne, D. Pereira de Souza, K. Twinn, B. Westerhoff. Boden : Nordenstorms förlag, 1994², 137 p. (91-971004-2-0).

Homo kaj religio / Ĉlovek a Nábozenství, de Ernesto Balaš, dulingva, Brno : Stredisko mnoha ver / Centro de multaj religioj, 1993, 28 p.

Tri tutmondaj proponoj, de Jesuo Raposo Montero, Valencia, 1993, 14 p.

La jogo de nutrado, de O. M. Aïvanhov, Fréjus : Prosveta, 1992, 123 p. (ISBN : 2-85566-542-6).

Religiistoj por Paco : intervjuo kun Rabeno Jeremi Milgrom, Jerusalem : Centro Sivron, 1990, 6 p.

Espero por la mondo : spirita galvanoplastiko, de O. M. Aïvanhov, 178 p. (ISBN : 2-85566-502-7).

Orienta speciala diina masaĝo, de Masyuki Sai-onji, Pekino : Xue Yuan (Akademia) Eldonejo, 1989, 191 p. (ISBN : 7-80060-461-6/R.18)

Ŝanco por feliĉo, de Ph. Bosmans, trad. el la nederlanda Lydia Kerremans [*Asistilo-kunlaborantino*], antaŭparolo de P. Hanjoul ("Movado sen Nomo"), Tielt : Lannoo, 1988, 96 p. (ISBN : 90 209 1528 2).

Chongjon : La Baza Skribo de Wonbulgyo, tr. de Ch'oe Tae-sok, Hong Song-jo kaj Yook Cheol, [dulingva : korea-esperanta], Seulo : Wonbulgyo-Esperantista Societo, 1988, 175 p.

La homa viv-aventuro, esearo : Aŭ konscia humaniga evoluo aŭ hazarda drasta evoluo, de G. Moya Escayola, Barcelona : Barcelona Esperanto-Centro, 1987, 302 p. (ISBN : 84-398-8887-2).

Survoje al pontokulturo : Materialoj por la kosmopolita humanismo (homaranismo), kun la Deklaracio pri Homaranismo (1913) de L.L. Zamenhof, [kompilita de H. Welger], Marburg : Homarana Asocio, 1987, VI-34 p.

La Evangelio laŭ Petro & La morto de Jesuo kaj kio poste ?, trad. el la helena de G. Berveling, Vlaardingen : Voĉoj Kristanaj, 1986², 12 p.

Esplorado de Vivoĝojo, de Hidemaru Deguĉi, tradukita de Eizo Ito, Kameoka : Internacia Fakto de Oomoto, 1986, 203 p.

Dio, kristanismo, aliaj religioj (1983), de Gerrit Berveling, Vlaardingen : Voĉoj Krist., 1985, 36 p.

La Bahaa Kredo, Leicestershire : Baha'i Publishing Trust, [s.d., 16 p.]

La krimoj de Dio, de Sébastien Faure, Laroque Timbaut : La Juna Penso, 1976, 32 p.

Rakontoj kaj poemoj, de Ĝ. Ĥalil' Ĥibrán, tr. el la araba de G. Abraham, enkondu. de Prof. G. Mattos, Rio : Kultura Kooper. de E-istoj, 1972, 150 p.

Novaj prireligiaj gazetoj

Informoj por la nunaj tempoj, M. A. Sobral, C.P. 173, Mairiporã, São Paulo. (1-3 : "lasta n-ro").

La "Enohumaneco", (trimonata ?), 2001 Eleonon Vojo, Akroyali Avias, 24100 Kalamata, Grekio.

La humanisto, E-Asocio de Humanistoj, W.H. Simcock, Butterton, Leek, Staffs., GB, ST13 7SR.

Ĝisdatigo (vidu jam p. 2 kaj 30)

Eltiraĵoj el la *Unua Bulteno*, pri la 5-a **Interreligia Seminario Esperantista** 8 ĝis 13-8-1999 en Kedzierzyn-Kozle (apud Opole) ĉe la Hotelo *Lech* (leĥ) en la kvartalo *Blachownia*.

La urbo estas haltejo sur la fervoja lineo **de Berlin al Krakow**, tra Wroclaw (aŭ tra Rzepin : 48 gld.).

La aliĝo, 110 gld, inkludas la loĝadon (en du- aŭ tri-litaj ĉambroj, krom aparta prefero) kaj la **matenmanĝojn**. Por tutseminaria (vegetara) manĝado ĉe la seminarieja restoracio, aldonu 70 gld. Se vi aliĝos **post la 28-a de junio, bonvolu antaŭpagi 64 gld.** Vi ricevos la *Duan Bultenon* komence de julio.

Temo : Spiritualeco kaj naturo, kun prelegoj de i.a. Bradio Moro kaj d-ro Rudolf Koppel, kaj partopreno de UTSLE : Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista, kiu samloke kunvenos. Ankaŭ eblas viziti la *Ekumenan Kongreson* (samtempan, en Gliwice). Partoprenantoj havos ŝancon diskuti en unike interreligia etoso pri temoj kiel homo kaj naturo, homaj rajtoj, religiaj kaj etnaj libereco kaj kunekzistado, kaj la homara spirita vivo en la venonta jarmilo... Estos **ekskurso** al la apuda *Monto de Sankta Anna*.

Adreso al kiu resendi la aliĝilon kaj pagon : ASISTI, Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando.

Aliĝilo

Mi aliĝas al la 5-a Interreligia Seminario Esperantista, laŭ la kondiĉoj dorsflanke kaj ĉi-malsupre.

– NOMO (*preslitere !*) :

– Adreso (*preslitere !*) :

– Mia spirita/religia tradicio estas :

(Nedevige. Cetere, la Seminario bonvenigas anojn de ĉiuj tradicioj, kaj humanistojn, agnostikulojn kaj ankaŭ ateistojn kun intereso pri religiaj demandoj.)

Mi proponas jenan programeron :

(Notu : Prozelitigaj prezentaĵoj ne taŭgas. Tamen prezentaĵoj pri iu aspekto aŭ persona sperto de ies propra spirita tradicio estas ĝenerale akcepteblaj, kaj same pri interreligiaj esploroj. Eblas ankaŭ proponi vin por gvidi diskut-rondon pri iu temo. La organizantoj rezervas al si la rajton aprobi ĉiujn oficialajn programerojn sed, laŭ la ebloj de tempo, principe aprobos ĉiujn kiuj estas ne tro damaĝemaj al intertradicia harmonio.)

Mi preferas : loĝi sole (en du- aŭ tri-lita ĉambro)

loĝi kun : (kaj :)

Mi bezonas gastigadan aranĝon aŭ ne povos partopreni.

Mi preferas manĝi : viand-inkluzive, vegetare,

laŭ jenaj apartaj bezonoj :

Mi havas korpan handikapon kiu postulas jenon :

Dato :

Subskribo :